

Germana Esperantisto

kun

Esperanto-Praktiko

Oficiala organo de Germana Esperanto-Asocio — (G. E. A.) — kaj de aliaj Esperantistaj Unuiĝoj
Amtliches Blatt des Deutschen Esperanto-Bundes E. V. und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Elvenas en la komenco de ĉiu monato

Abonprezoj kaj prezoj por anoncoj estas ŝanĝeblaj; ili estas speciale publikigataj sur la unua kovrilpaĝo de ĉiu numero



Erscheint zu Anfang eines jeden Monats

Bezugs- und Anzeigenpreise sind veränderlich; sie werden auf der ersten Umschlagseite jeder Nummer bekanntgegeben

Fondinto: J. Borel — Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek — Respond. redaktoro: Arnold Behrendt
Alsenditajn artikolojn ni korektas laŭ bezono. Nepresitajn manuskriptojn ni resendadas nur, se oni aldonis afrankojn por tio

21a Jaro No. 12 (346) | Eldonejo kaj redaktejo: Berlin SW61, Wilmsstr. 5 | Decembro 1924

Perspektivoj

Finante nian alvokon al la abonantaro de G. E. en la lasta numero de l' pasinta jaro, ni esprimis la esperon, ke la nuna jaro fariĝu pli bona ol la antaŭa. Ĉi tiu espero realiĝis ĝis certa grado. De unu jaro la germana valuto estas stabila, kaj dank' al tio la ekonomia korpo de nia lando iom post iom saniĝis dum la nuna jaro. Sed ĉi tiu procedo ankoraŭ ne atingis sian finon; de tempo al tempo la saniĝanta korpo ankoraŭ konvulsias pro sufiĉe fortaj atakoj. Tamen estas ne nur esperable, sed eĉ certe antaŭvideble, ke la saniga evoluo ne daŭre plu estos interrompata kaj ja malrapide, sed konstante prosperos. Tial ni povas atendi la novan jaron kun la plej bonaj esperoj.

Ankaŭ nia gazeto profitis de la pliboniĝanta stato ekonomia. Ni komencis la nunan jarkolekton ankoraŭ kun timo pro la ekzistebleco de G. E. La abonantaro ne estis sufiĉe granda, ni perdis multajn fidelajn abonintojn, ĉar la batalo pro la vivo devigis ilin, provizore forlasi la amatan okupon pri Esperanto. Sed de monato al monato la stato pliboniĝis. La deturniĝintoj revenis, kaj novaj abonintoj alvenis, dank' al la preskaŭ neesperita progreso de la Esperanto-movado en Germanujo. Nia alvoko al la germana Esperantistaro en la unua numero de la nuna jarkolekto ne restis neaŭdita. Spite de malbonaj cirkonstancoj, kiuj kontraŭstaris al la laboro por Esperanto, restis fidela aro da nekonsciaj obstinuloj, kiuj nelacigeble daŭrigis la batalon por la granda afero. Dankon, multan dankon ni ŝuldas al tiuj bravaj pioniroj, kiuj per sia laboro helpis ankaŭ al tio, ke G. E. nun ricevas stari sur iom forta fundamento, kiu ebligas kompost-ioman pligrandigon de ĝia konstruaĵo. Pri la vere ĝojigaj sukcesoj atingitaj dum la nuna jaro, kompetentulo resume raportos en la unua numero de la venonta jarkolekto.

Specialan dankon ni ŝuldas al la membroj de Germana Esperanto-Asocio, kiuj en la nunjara ĉefkunveno de la Asocio en Plauen i. V. redonis al G. E. tion, kion ĝi posedis preskaŭ de la komenco de sia ekzistado, sed kion ĝi perdis dum la malfeliĉaj jaroj pasintaj: la devigan abonon por ĉiuj asocianoj. Oni bone konsciis la gravecon de

deviga oficiala organo por la Asocio, organo, kiu, mem sufiĉe forta, ankaŭ siaflanke multe povas antaŭenpuŝi la komunan aferon. Dank' al la dirita decido la abonantaro de G. E. dum la lastpasintaj monatoj kreskis tiel, ke la elspezoj por la gazeto nun ne plu tiel multe kiel antaŭe superas la enspezojn, fakte, kiu kuraĝigas nin al plibonigo pli sube preparolota.

Laste-ne-laste ni dankas ankaŭ al niaj eksterlandaj abonantoj, kiuj per sia subteno kunhelpis atingi la pli favoran staton de G. E. La enhavo de la gazeto verŝajne ne ĉiam tute kontentigas ilin pro la pli-malpli multaj germanlingvaj artikoloj necesaj por la propagando en Germanujo; sed ni supozas, ke la pli granda Esperanta parto de la enhavo estas sufiĉe interesa ankaŭ por negermanoj, ĉar alie ne estus klarigeble, ke ankaŭ la eksterlanda abonantaro de G. E. rimarkinde kreskis dum la pasinta jaro.

Ni jam diris, ke la Esperanto-movado en Germanujo ĝojige progresis dum la lasta tempo. El tio rezultas la fakto, ke de kelkaj monatoj la nuna amplekso de G. E. ne plu sufiĉas por la konstante pliamasiĝanta materialo publikigota. Tiamaniere la malbona ekonomia malsano estas anstataŭigata per alia, ja ne danĝera, tamen nepre kuracinda malsano: manko de loko. Por forigi ĝin, ni devas plimultiigi la paĝojn de la kajeroj de G. E. Jam ĉi tiu numero enhavas 32 paĝojn anstataŭ la 24 ĝisnunaj, kaj samampleksaj ĝisplue estos la numeroj de la venonta jarkolekto. Sed ni promesas ankoraŭ ion plian: se la cirkonstancoj iel permesos tion, ni plibeligos nian gazeton kiel eble plej baldaŭ per ilustraĵoj en ĉiu numero, per kio la enhavo certe fariĝos ankoraŭ pli interesa, ol ĝi jam nun estas.

Estas kompreneble per si mem, ke la pliampleksigo ŝarĝas la eldonejon per novaj elspezoj, kiuj krome pligrandiĝas per tio, ke la ĝeneralaj preskostoj, jam dufoje plialtiĝintaj dum la nuna jaro, nun trian fojon grave altiĝis. Tamen ni ne tiros la konsekvencon el tio, altigante ankaŭ la abonprezon por G. E.; ĝisplue ĝi restos la sama kiel nun, malgraŭ tio, ke ni donos ok paĝojn pliajn, kiuj precipe utilis al la literatura parto en Esperanto-Praktiko. Sed prenante sur nin la novan finanĉan ŝarĝon, ni atendas de niaj ĝisnunaj abonintoj, ke ili ĉiuj

ne nur restos fidelaj al ni en la venonta jaro, sed ankaŭ varbos novajn abonantojn, por ke per plimultiĝintaj abonoj estu repagataj niaj pligrandiĝintaj elspezoj. Se la Esperanto-movado, kio estas supozebla, ankaŭ en la nova jaro bone progresos, nia espero certe realiĝos, kaj nia fido al la forteco de la movado estos rekompencata.

Sed neniu pensu, ke li nun ne plu bezonas kunlabori por la progreso de Esperanto! La celo ja jam vidiĝas de malproksime, sed por atingi ĝin, ankoraŭ intensa kaj sufiĉe malfacila laboro restas necesega! Ju pli multe da batalantoj sin kunigas por forta agado, des pli frue la venko okazos:

Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi paciencie eltenos!

Finante per ĉi tiu parolo de nia majstro Zamenhof, ni deziras al ĉiuj legantoj kaj amikoj de G. E. gajan Kristnaskon kaj feliĉan jarfinon. Ni ĉiuj iru kuraĝe kaj esperplene en la novan jaron!

Eldonejo kaj redakcio de G. E.

La 15a de Decembro

Memoriga parolo de *Behrendt*

La 15an de Decembro 1859 naskiĝis Lazaro Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto. Ne per kristana ceremonio akceptis lin la homaro; li estis izraelido. Sed kvankam la malnova testamento regis lian eniron en la mondon, li tamen perceptis kaj komprenis la novan testamenton pli bone ol kelkiu kristano. Por li religia kredo ne ludis rolon, sed religio vivis en li, — tiu religio, kiu estas komuna, nepereigebla posedaĵo de l' homaro. Zamenhof ne fariĝis „homarano“ pro iaj motivoj, li estis tia! Lia ideo pri „Dio“ estis tre reala; lia Dio postulis de li ĉion por surteraj homoj. La „ĉielo“, en kiu lia Dio agis, estis kapt-ebla por li: ĝi estis prudento, saĝeco, racio kaj komprenema amo al proksimulo. Nur geniulo povis submeti sian vivlaboron al tia Dio kaj efektiviĝi ĝin en tia ĉielo. Zamenhof estis geniulo. Ĉu li sciis ĉi tion? Kia demando! Kaj kiel trovi la respondon? Sendube — la meditema aŭtoro de Esperanto estis hejma en la ĉielo de prudento, saĝeco, racio kaj amo; li havis konfidon al sia verko; alikaze li ne estus publikiginta sian lingvosistemon. Kaj ŝajnas al mi, ke „konfido al si mem“ estas unu el la plej gravaj, neniakondiĉe malhaveblaj trajtoj de geniulo, ĉar genio entenas volforton. Indiferente estas, ĉu Zamenhof respondis al si la demandon „ĉu mi estas geniulo?“ — Sufiĉas, ke li estis tia. Alia trajto de geniulo, kiun Z. montris, estas lia pacienco. Dum multaj, multaj jaroj li laboris pri sia verko kaj eĉ formetis ĝin, kiam eksteraj cirkonstancoj postulis tion. Sed li havis konfidon al si kaj al sia verko; lia volforto iutage forigis ĉiun baron, kaj la homaro ricevis la lingvon Esperanto! Nur tiu, kiu konas la vivon de Z., povas ĝuste taksii, kiel granda estis la volforto montrita. Kiam Z. konstatis, ke tie kaj tie prezentigis kunbatalantoj, kiuj akceptis lian verkon, — ĉu iu el ni kapablas kompreni tion, kio ekvivis en liaj koro kaj animo? Sed certe estas, ke sincera danko al lia Dio flugis en la ĉielon. Kaj tia dankema homo Z. restis. La ekstera signo por tia

danko estis lia modesteco. La viro, naskiĝinta en la kristnaska monato, aŭdis la kristnaskan sonorilon, kiu vokas: „Honoro al Dio en la ĉielo!“ Z. sin sentis kiel ilon de sia Dio, por ke li helpu doni al la homaro la pacon, al kiu ĝi sopiras de jarmiloj. Grandegan baron, por atingi la tiel sopiratan, dolore amatan pacon, Z. vidis en la diverseco de lingvoj, kiuj malhelpas, ke la homoj komprenas unu la alian trans la limojn de gento kaj nacio. Sentante sian kapablon — indifere, ĉu konscie, ĉu nekonscie! — Z. eklaboris sur la lingva kampo; li humile obeis laŭ sia povo la vokon de l' kristnaska sonorilo: „— kaj paco sur tero“, — jen voko, kiu estis por Z. ordono de lia Dio: helpu krei ĝin! — Nur post multa penado tiu paco ja estas atingebla; antaŭ la plej alta juĝisto sufiĉas, ke la homo estas volonta kaj aspiranta la bonon; al tia vivado sekvas la beno, kiu konsistas en anima trankvileco, en la certeco, ke la vivo ne estis vana. Z. povis esti konvinkita pri tio, ke lia, favorita de Dio vivlaboro estigos fruktojn, kiuj kreskas por ĉiu, kiu — humile kaj modeste, sed volforte — laŭ povo helpas, krei pacon sur tero. Z. vidis ankoraŭ benon kaj — mortis, kiam la homoj — kiel jam ofte — opiniis, ke sanga batalo estas la lasta rimedo por atingi ilian celon. Rerigardante al la vivado de Z. min ekkaptas la certeco, ke lia vivo pasis en favoro de lia Dio; jen favoro, en kiu li deziris partoprenigi la tutan homaron: li ja aŭdis la kristnaskan sonorilon: „— kaj al la homoj Difavoro!“ Kaj al tia voko de kristnaska ordono ankaŭ ni obeu, memorante pri homo, kiu donis ĉiun honoron al sia Dio pro vera modesteco, kiu kunlaboris starigi pacon sur tero pro profundega amo al proksimulo, kiu deziris Difavoron al ĉiu homo, ĉar ankaŭ li estis homo kaj sentis, kiagrade ĉiu homo bezonas la favoron de sia Dio. Ĝuste perceptu ni ĉiuj, solene festante en la memortago de l' naskiĝo de Zamenhof, la vokon de la kristnaska sonorilo: „Honoro al Dio en la ĉielo, paco sur tero kaj al la homoj Difavoro!“

Resonado

(Ĥo de Eko)

Dimanĉon, la 16an de Novembro, matene, mi kuŝis dolĉe dormante en mia lito. Subite mi vekigis pro forta frapo ricevita sur mian kapon. Estis la kara Ekino, kiu tiamaniere „karesis“ min.

„Eko!“ ŝi kriis, „tuj ellitiĝu! Vi devas veturi al Königswusterhausen por radiokanti! Estas jam malfrue!“

„O-o-a-a, mi ne povas kanti, mi havas raŭkan voĉon, mi malvarmumis antaŭhierau nokte, hejmenirante post la provo ĉe gesinjoroj Liebeck.“

„Tamen vi devas veturi al Königswusterhausen. Aranĝinte la unuan Esperantan radio-prezentadon en Berlino, vi nun ne rajtas malĉeesti ĝin kaj fuŝi la programon. Do — rapidu, rapidu!“

Ŝi estis prava, kaj mi obeis. Rapide mi vestis min, trinkis kafon kaj preskaŭ kuris al la stacidomo, kiun mi feliĉe atingis kelkajn minutojn antaŭ la forveturo de l' vagonaro. Ŝvitante mi kuris laŭlonge de la vagonaro por serĉi miajn prezentadkunulojn. Sed, ho vel! — eĉ ne unu el ili mi

trovis! Ĉu ankaŭ ili tro longe dormis kaj sekve de tio maltrafos la vagonaron? Tremante mi rigardis la stacidoman horloĝon. Senkompate la granda montrilo antaŭeniras minuton post minuto. Fine — du minutojn antaŭ la forveturtempo — mi vidis la kunularon suriranta la kajon. Dank' al Dio! Malpeziganta ekĝemo eliĝis el mia brusto. Mi mansignis al malfermita kupeo, kaj apenaŭ ni estis enirintaj, la vagonaro ekveturis. La aliaj kunuloj estis atendintaj antaŭ la stacidomo kaj tie renkontintaj unu la alian, kaj mi ne vidis ilin pro mia rapideco.

Ni estis sep personoj: Dro Liebeck kun edzino, f-ino Nickel, s-ro Behrendt kaj mi kiel agontoj, s-ro Glück, la prezidanto de la Gruparo Berlin, kiel kontrolonto kaj s-ro Feder el Chemnitz, kiu vojaĝante trapasis Berlin-on, kiel invitita gasto.

Dum la unuhora veturo ni babilis pri nia entrepreno kaj la perspektivoj por ĝia sukceso. Ni estis starontaj la unuan fojon publike antaŭ la mikrofono de radio-stacio por aŭdigi nian voĉon al nevidebla aŭskultantaro tutmonda. Mi legis antaŭ nelonge en iu radio-gazeto, ke eĉ artistoj, kiuj kutimas ĉiutage prezenti sin al videbla aŭskultantaro, ofte fariĝas timemaj antaŭ la mistera aparato komunikanta la kontakton kun la publiko. Koncerne min, Ekino antaŭdiris al mi ion tian. Sed mi trankviligis ŝin: „Ĉu gazeteldonisto, kiu ne timas la multkapan hidron de legantaro, timu la radio-hidron? Ne! Mi estos kuraĝa!“ Ankaŭ la aliaj ne havis antaŭtimon, tiom malpli, ke la sankta nombro sep de nia areto kaj la feliĉo (germ. Glück), kiun ni havis inter ni, jam antaŭe supozigis bonan sukceson. Tamen — oni ne tro multe fidu al la providenco! Pro tio la gekantontoj el ni suĉmanĝis kelkajn Ems-ajn pastelojn por glatigi la laringon.

Alveninte en Königswusterhausen, ni gaje marŝis en hela sunbrilo al la granda ĉefradio-stacio, kies altegaj anten-mastoj estas videblaj je multkilometra distanco. En la stacio afable akceptis nin inspektoro Schwartzkopf, la aranĝestro de la ĉiudimanĉaj prezentadoj tieaj. Klarige mi volas aldoni ĉi tie, ke la oficiala stacio Königswusterhausen ne ĉiutage disaŭdigas distran programon, kiel faras tion Vox-Haus en Berlin, sed nur dimanĉe inter la 10.40 kaj 12.50 h. kaj je specialaj okazoj aranĝas prezentadojn, kiuj ĝenerale konsistas el koncertoj instrumentaj kaj kantaj. La dimanĉaj programoj konsistas el du partoj: la unua, destinita precipe por germanlandaj ricevantoj kaj daŭranta de la 10.40 ĝis la 11.40 h., estas sendata sur ondo 680; la dua, destinita precipe por eksterlandaj ricevantoj kaj daŭranta de la 11.50 ĝis la 12.50 h., estas sendata sur ondo 2800.

Sed nia ĝojo pri la venontaĵoj estis malgrandigata per malagrabla sciigo, kiun s-ro Schwartzkopf faris al ni tuj post reciproka salutado. Ŝajnis, ke s-ro Behrendt estis en konflikto kun la providenco: La kutima ondo 680 de la unua parto, en kiu li estis faranta sian germanlingvan paroladon pri la graveco de Esperanto por radio, ĝuste en tiu tago pro teknikaj kaŭzoj devis esti ŝanĝata al 2450. Estis klare, ke la plej multaj ricevantoj en Germanujo, ne posedantaj ricevilojn por ondoj pli longaj ol 800 m, ne aŭdos la paroladon. Ĉi tiu cirkonstanco kompreneble malbone efikis al ĝia celo. Domaĝe!

Kelkajn minutojn antaŭ la komenciĝo de l' programo ni eniris la prezentad-ĉambrom. Ĝi estas tute drapirita per blanka ŝtofo, aranĝita tiel, ke ĝi reflektas la disvastiĝantajn sonojn al la mikrofono staranta en angulo. Ĉi tiu ĉambro estas uzata nur por muzikaj prezentaĵoj; paroladoj estas farataj en apuda ĉambro per ordinara telefono.

10 40 h.! S-ro Schwartzkopf sur ondo 680 anoncas al la aŭskultantoj la komenciĝon de la programo kaj la ŝanĝon de la ondolongo por la unua parto. Poste li diras kelkajn vortojn pri la speciala Esperanto-disaŭdigo de l' hodiaŭa tago kaj prezentas la funkcionajn artistojn. Kiam estas nia vico, ni aŭdas: „S-ro telegraf-direktoro Behrendt germanlingve parolos pri Esperanto, kaj f-ino Nickel kaj s-ro Dro Liebeck kantos en Esperanto; ĉe la fortepiano — Friedrich Ellersiek! Aŭdinte ĉi tion, mi preskaŭ svenis, dum la aliaj mute ridis; se ne estus ordonita nepre silento dum la tuta prezentado, ili certe estus eksplodintaj pro ridego. Mi, kiu eĉ ne scias ludi simplan melodion sur la fortepiano, akompanu kantojn eĉ nepreparite? Sankta Sebastiano, helpu min, eviti la katastrofon! Kaj la sanktulo helpis. Li ekkonigis al la anoncanto, ke li legis fuŝe skribitan manuskripton, en kiu la nomoj estis erare miksitaj. Antaŭ la komenco de la dua parto la eraro estis korektata.

La du unuaj numeroj de la programo estis muzikaĵoj, ludataj de kordinstrumenta kvarteto kun fortepiano. La ludantoj estis veraj artistoj; ili prezentis ankaŭ ĉiujn ceterajn muzikaĵojn de la tuta programo. La tria numero estis la parolado de s-ro Behrendt. Li rakontis fabelon de avinjo pri la modernaj komunikiloj, kiuj dum malmultaj horoj aŭ eĉ nur sekundoj portas la homon aŭ lian spiriton de popolo al popolo. De kontinento al kontinento oni transigas sciigojn en unu lingvo komprenata de ĉiuj, kaj ĉi tiu lingvo ne estas la angla, franca aŭ germana, sed internacia lingvo por ĉiuj popoloj. Sed la fabelo jam realiĝis: jen Esperanto, kiu jam estas uzata en interpopolaj interrilatoj kaj nun pli kaj pli ankaŭ por radio. Sekvis kelkaj klarigoj pri Esperanto mem kaj ĝia bonega taŭgeco por radio, pri ĝia kulturvaloro por la homaro ktp. La parolado daŭris 11 minutojn, sed malgraŭ sia mallongeco ĝi enhavis plenecon da konvinkantaj argumentoj por instigi ne-esperantistajn aŭskultantojn al la okupado pri nia lingvo. La parolmaniero kaj prononcado de s-ro Behrendt estis vere modelaj. Tio estas tute komprenebla; kiel telegraf-direktoro en la germanregna poŝtministerio li estas fakulo pri telegrafado per kaj sen fadenoj, kaj li bone scias la efikon de la parolata vorto en telefonio kaj radio*).

Post la parolado sekvis du muzikaĵoj ludataj de la supre dirita orkestro, kaj post finsoniĝo de la lasta numero s-ro Schwartzkopf fermis la unuan parton per la alvoko: „Ĝis reaŭdo post 10 minutoj sur ondo 2800!“

Niaj kantontoj nun faris mallongajn kantprovojn por ekzameni la voĉojn kaj informiĝi pri ilia sonado en la prezentad-ĉambro. Ĉio funkciis tiel bone, ke ni sentime povis atendi la venontaĵon. S-ro Schwartzkopf prezentis al la sinjoroj cigarojn en

* La originala teksto de la parolado troviĝas sur paĝo 228 de ĉi tiu numero. Red.

kesto surhavanta la avizon „Nur por artistoj!“ Ĉu ni prenu ion de tiu artistajo? Jes! En ĉi tiu tago ni ja estas artistoj. Niaj sinjorinoj ja iom grumblis pri la fumado, sed verŝajne ili estis nur enviemaj, ĉar oni ne prezentis al ili ĉokoladon. Nepardonebla malĝentileco kontraŭ la bela sekso!

Dum la paŭzo salutis nin ankaŭ telegraf-direktoro Gerlach, la estro de la stacio. Li montris grandan intereson pri Esperanto kaj pri niaj prezentaĵoj, kaj li promesis al ni, ke ni pli ofte povos disaŭdigi Esperantaĵojn, se la stacio Königswusterhausen daŭrigos siajn dimanĉajn sendadojn. Ĉi tio ankorau ne estas certa kaj dependas de diversaj cirkonstancoj ĉi tie ne pritrakteblaj.

Direktoro Gerlach rakontis al ni, ke ankaŭ la ldistoj estis proponintaj paroladon pri la mondlingva demando. Kiel sincera amiko, kiaj ili estas al la Esperantistoj, ili kompreneble nur volis kunhelpi por atingi la „komunan celon“. Kantojn en ldo ili ne proponis por montri la belsonecon de sia lingvo. Ili estas seriozaj homoj, kiuj ne ŝatas la kantadon; ili okupiĝas nur pri la scienca flanko de internacia lingvo. Sed modestaj, kiaj ili ankaŭ estas, ili ne fanfaronas pri tio, ke ldo estas malriĉa je kantoj kaj ke ĉi tiuj estas superfluaĵoj, ĉar ekzistas nur malmultaj personoj, kiuj povus kompreni ilin. Vere, la ldistoj estas tre amikaj kaj modestaj, kaj ĝuste pro ĉi tiu bela virto — ilia propono ne estis akceptita. Ni ankaŭ ne bezonis ilian helpon. Ni demonstraciis sufiĉe konvinke, ke Esperanto estas vivanta lingvo de granda tutmonda popolo, ke ĝi estas la internacia komprenilo, kiu propraforte iras sian vojon kaj atingos la celon.

11.50 h.! La dua parto de l' programo komenciĝas. La unua numero estas instrumenta muzikprezentaĵo, la dua estas nia. F-ino Nickel komencas, kantante tri strofojn de „Tagiĝo“. Nur malofte mi aŭdis ŝin kantanta tiel brile kiel nun. Ŝi kantas ne nur sonojn kaj vortojn klare aŭdeblajn, ŝi kantas ne nur per la buŝo, sed el ŝia koro elfluas la granda entuziasmo de intern-idea Esperantistino kaj miksas sin kun la sonoj kaj vortoj al vera himno.

Kiel dua kantas Dro Liebeck. Per sia forta, belsona baso li prezentas „Kanto de Weyla“ kaj aldonas la popolkantan baladon „La mastrina filino“. Lia kantarto estas belega. Ankaŭ lia Esperanta prononcado estas sufiĉe bona, kvankam li estas tute nova Esperantisto. Kiu ne scias ĉi tion, certe pensas, ke jam dum longa tempo li studis nian lingvon.

La kantoj de f-ino Nickel kaj Dro Liebeck estas akompanataj sur la fortepiano de s-ino Liebeck, kiu plenumis sian taskon kun majstreco. Tio estas komprenebla, ĉar ŝi estas perfekta artistino.

Fine kantis f-ino Nickel kaj mi la germanan popolkanton „Knab' rozeton vidis li“. Ĉar mi mem estis kunaganto, mi ne rajtas juĝi pri ĉi tiu prezentaĵo. Mi nur volas diri, ke dank' al la direktado de Dro Liebeck ni du gekantantoj almenaŭ kune komencis kaj finis ĉiun el la tri strofoj. Sed ankaŭ tion mi povas malkaŝi, ke s-ro Glück estis tiel entuziasmigita, ke li spontone aplaudis nin, antaŭ ol la mikrofono estis malkonektita. Tiamaniere ankaŭ li, kiel kontrolinto, rimarkigis al la radio-ricevintoj, ke li plenumis sian taskon.

S-ro Behrendt finis la Esperantan parton per mallonga alparolo en E. al la aŭskultintaj Esperantistoj tutmondaj, kiujn li petis, informi la oficejon de Gruparo Berlin pri la aŭditaĵoj pri kaj en E.

Ni ĉiuj estis tre kontentaj pri la bona paso de nia unua radio-prezentado; neniu el ni havis la tielnomatan „surscenejan febron“, pri kiu mi jam parolis pli supre. Ankaŭ kontraŭ la tekniko de l' sendado la kantintoj ne multe pekis, ĉar s-ro Schwartzkopf, kiu kontrolaŭskultis la tutan kantadon, nur po unu fojo bezonis korekti la starlokon de f-ino Nickel kaj Dro Liebeck rilate al la mikrofono.

La cetera programo aŭdigis ankoraŭ du orkestrajn muzikaĵojn kaj unu modernan spritkanteton, kaj ĝi finiĝis per ludado de la germana himno nacia.

Mi ne povas fini mian babiladon, ne menciante ankaŭ alian sukceson de la memorinda tago: la fondon de Germana Radio-Esperanta Ligo, kies estraro elektiĝis en la stacio Königswusterhausen tuj post finiĝo de la programo. En alia loko de G. E. estas pli detale raportate pri tio. Speciale grave estas, ke la direktoro de la stacio, s-ro Gerlach, akceptis la vic-prezidantecon de la ligo kaj per tio pruvis sian veran intereson pri nia afero. La ligo celas la enkondukon de Esperanto por radio en germanlingvaj landoj.

El diversaj lokoj, en- kaj eksterlandaj, ni jam ricevis informojn pri tre bona kaj klara aŭdebleco de niaj prezentaĵoj. Multan dankon al la skribintoj, speciale al s-ro inĝ. Scholze el Reichenberg (Bohemujo), kies serioza kritiko estas tre valora por venontaj disaŭdigoj, kaj al s-ro Guttmann el Pyhanken apud Teplitz-Schönau (Ĉeĥoslovakujo) pro lia interesa artikolo „Du horojn en la sorĉo de Königswusterhausen“ publikigita en „Teplitz-Schönauer Anzeiger“. En Teplitz-Schönau oni estis aranĝinta specialan propagandan kunvenon pro nia prezentado.

Ankaŭ Ekino ĝojis, kiam mi, hejmenveninte, raportis al ŝi pri la kontentiga sukceso de l' tago. Ŝi multe bedaŭris, ke ŝi ne povis ĉeesti en la stacio. „Venontan fojon!“ mi konsilis ŝin. „Tiam vi eble eĉ povos kunkanti. Sed antaŭe bone ekzercu vian voĉon kaj kantu gamojn kaj gamojn, por ke vi ne maltrafu la ĝustajn tonojn!“

„Ho, vi fripono!“ ŝi kriis responde kaj... (pri la cetero mi silentas).

F. Ellersiek

Manuskriptoj,
kiujn ni ricevas post la 15a, neniel
povas esti akceptataj por la
sekvanta numero!
Oni ne forgesu ĉi tion!!

Eine Volkshochschule über-Esperanto

Wir erhielten folgendes Schriftstück, auch ein Zeugnis für den gegenwärtigen Kulturstand gegenüber dem Esperanto. Es lautet wörtlich:

Mainz, den 12. September 1924

An den Esperanto-Bund
Ortsgruppe Mainz

Auf Ihr Schreiben vom 1. August ds. Js. betreffs Aufnahme eines Esperanto-Kursus in den Lehrplan der Volkshochschule müssen wir, nachdem die Angelegenheit im Kuratorium zur Besprechung gekommen ist, erwidern, daß wir leider nicht in der Lage sind, Ihrem Vorschlage zu entsprechen. Aus dem Vorlesungsverzeichnis der Volkshochschule Wiesbaden erschen wir, daß dort eine größere Zahl von Sprachen, darüber hinaus aber auch Schönschreiben und Stenographie, rein technische Fertigkeiten, getrieben werden. Die hiesige Volkshochschule sieht ihre Aufgabe darin, ihren Hörern Gelegenheit zu geben, ihre Anteilnahme am Kulturbesitz der Menschheit zu erarbeiten, glaubt aber, die Übermittlung aller derjenigen Kenntnisse und Fertigkeiten, die lediglich als Hilfsmittel dazu dienen können und nicht selbst Kulturwert haben, den Fortbildungseinrichtungen anderer Art überlassen zu sollen. Wir nehmen an, daß die Ortsgruppen des Esperanto-Bundes den interessierten Kreisen Gelegenheit zur Erwerbung der Sprache, deren Bedeutung auch von uns nicht verkannt wird, geben.

Mit vorzüglicher Hochachtung

Volkshochschulverein Mainz, E. V.
gez. Dr. Kruckenberg

Also: Schönschreiben, Stenographie und Esperanto sind 1. nur *Fertigkeiten* und 2. nur *Hilfsmittel* zur Anteilnahme am Kulturbesitz der Menschheit, besitzen aber selbst *keinen Kulturwert*. Deswegen wird ihr Unterricht an der Volkshochschule Mainz abgelehnt.

Gegen diese Entscheidung erhebt der Deutsche Esperanto-Bund Einspruch und begründet ihn wie folgt:

a) Schönschreiben, Stenographie und Esperanto können unter dem Titel „Fertigkeiten“ gar nicht auf eine Stufe gestellt werden. Die beiden ersten lehren allerdings die Kenntnis von Schriftarten bei mechanischer Ausübung, also Fertigkeiten. Esperanto ist aber etwas ganz anderes, nämlich eine *organische Sprache* mit eigenem Geist und Leben. Esperanto ist in allen Kulturländern bekannt und ist eine lebende Verkehrssprache, genau so wie die deutsche. Diese wird ja auch nicht und kann auch gar nicht unter „Fertigkeiten“ in den Lehrplan der Volkshochschule eingeordnet werden, ebenso wenig wie Esperanto. Daß es bürokratischen Schulmännern der alten Schule schwer fällt, das ihnen unheimliche und unbequeme Esperanto unter „moderne Volkssprachen“ einzureihen, ist ja durchaus verständlich; dies ändert aber nichts an der Notwendigkeit. Denn eine andere Stelle findet sich schlechterdings nicht im Lehrplane für diese Neuerscheinung der Kultur.

b) Die Ablehnung erfolgte auf Grund einer einfachen Besprechung im Kuratorium, also nicht auf Grund einer eingehenden Beratung. Sachverständige, in diesem Falle also auch esperantokundige Schulmänner, wurden nicht zugezogen. Wäre dies der Fall gewesen, so würde es unserer Organisation sofort gemeldet worden sein. Die Frage „Esperanto in seiner Bedeutung für den Volkshochschulunterricht in Mainz“ ist also sachlich unzureichend, ohne genügende Kenntnis der einschlagenden Verhältnisse, behandelt worden.

c) Die Ablehnung steht im Widerspruch zu den Erlassen des Preußischen Ministers für Wissenschaft, Kunst und Volksbildung vom 10. März 1924 und des Reichsministers des Innern vom 31. März 1924, wonach der Erteilung des Esperanto-Unterrichts in allen höheren Lehranstalten Preußens und der Reichsländer seitens der Schulkollegien Vorschub geleistet werden soll. Diese beiden wichtigen Erlasse sind offenbar gar nicht zur Kenntnis des Kuratoriums gelangt.

d) Die Ablehnung steht auch im Widerspruch zur Weimarer Verfassung, die dem deutschen Volke und seinen Erziehungsanstalten die Völkerversöhnung zur Pflicht macht. (§ 148.)

Die internationale Konferenz der Lehrer aus 28 Ländern der Erde und offizielle Vertreter von 16 verschiedenen Regierungen beschlossen 1922 in Genf einstimmig, daß der Esperanto-Unterricht in den Schulen gefördert werde, nicht nur wegen seines Nutzens für Handel, Wissenschaft und andere Zweige internationaler Betätigung, sondern auch wegen seiner Bedeutung für die Entwicklung freundschaftlicher Beziehungen zwischen den Völkern.

Die Vollversammlung des Völkerbundes*) nahm am 21. September 1922 diesen Beschluß an. Esperanto ist also ein von den Sachverständigen und Regierungen Deutschlands und aller Staaten des Völkerbundes anerkanntes Erziehungsmittel im Sinne der Weimarer Verfassung.

Es kann demnach gar kein Zweifel darüber bestehen, daß die deutschen Volkshochschulen *verpflichtet* sind, Esperanto lehren zu lassen.

Nun verkennt das Kuratorium ja durchaus nicht die Bedeutung des Esperanto, aber es rechnet dasselbe nur unter die Hilfsmittel zur Anteilnahme am Kulturbesitz, und da die Volkshochschule in Mainz solche Hilfsmittel, im Gegensatz zu Wiesbaden, nicht selbst lehren will, so überläßt sie den Unterricht den zuständigen Ortsgruppen des Deutschen Esperanto-Bundes. (Daß hierin eine Mißachtung der Kulturtätigkeit der Esperanto-Organisation liegt, sei nur nebenher angemerkt.) Darüber, daß die einheitliche, leichtfaßliche, allen Anforderungen entsprechende Welthilfssprache Esperanto ein geeignetes Mittel ist, alten Kulturbesitz der Völker, wie er etwa in den Volksgesängen und Schriftwerken aller Art niedergelegt ist, weiter zu übertragen, darüber herrscht also keine Meinungsverschiedenheit. Der Beschluß des Kuratoriums unterscheidet ganz richtig zwischen Kulturbesitz, wie er von früheren Geschlechtern bis zur Gegenwart geschaffen ist und fortwirkt, und Kulturwert, wie

*) Die hierfür eingesetzte Kommission des Völkerbundes hat am unparteilichsten, sorgfältigsten und sachkundigsten die Esperantofrage untersucht.

ihn Erfindungen der Gegenwart aufweisen müssen, wenn sie in der Volkshochschule gelehrt werden sollen.

Die deutsche Sprache übermittelt kommenden Geschlechtern das Kulturgut des deutschen Volkes. Sie ist aber, wie schon Goethe ausführte, vor anderen Sprachen geeignet, das Kulturgut auch anderer Völker in wort- und sinngetreuen Übersetzungen zu verbreiten. Zum Nutzen dieser Völker, zum Nutzen unseres Volkes und zum Nutzen des allgemeinen Kulturfortschrittes. Also nicht nur wegen der Verständigung unter Deutschen in der ganzen Welt, sondern auch wegen der Nutzbarmachung des Weltkulturgutes für unser Volk gehört die deutsche Sprache in die Volkshochschule. Andere Volkssprachen, z. B. die arabische, bulgarische, chinesische, dänische, finnische, holländische, indische, japanische, norwegische, polnische, kroatische, slovenische, tschechische, türkische und ungarische Sprache haben diese umfassende Übersetzungseignung nicht und außerdem eine viel zu geringe praktische Reichweite.

Und trotzdem schaffen auch diese Kulturvölker eine Fülle von Kulturgut, das viel zu wenig bekannt ist. Und es wurde nicht bekannt, weil es nicht gedruckt werden konnte und die mündliche Übertragung begrenzt blieb. Es wurde aber nicht gedruckt, weil die Druckwerke infolge geringer Absatzmöglichkeit zu teuer wurden. Das gleiche gilt weitgehend auch für den Kulturbesitz der großen europäischen Kulturvölker. Es kann heute einfach nicht mehr alles, was in einer Nationalsprache als wertvolles Kulturgut niedergelegt ist, in alle anderen Nationalsprachen übersetzt und dann gedruckt werden. Dies verbietet sich aus sprachlichen, geldlichen und technischen Gründen. Andererseits ist es aber heute auch für jeden einzelnen Menschen unmöglich geworden, alle Nationalsprachen zu lernen, um unmittelbar die Urtexte zu genießen. Da kommt nun, nach 200jähriger Vorbereitung, die Welthilfssprache Esperanto, die alles, ohne eigene nationale Sonderfärbung, wort- und sinngetreu übersetzen und infolge des Weltabsatzes ihre Druckwerke auch sicher und billig verbreiten kann; wird denn durch diese, *nur* als ein Hilfsmittel verächtlich gemachte neue Sprache nicht ein Kulturfortschritt erzielt, der bisher unmöglich war? Es kommen ja durch die Esperanto-Übersetzungsliteratur jetzt, wo auch die kleineren Völker politisch eine höhere Bedeutung gewonnen haben, Schätze ans Tageslicht, die man früher gar nicht vermutete! Und dies zu einer Zeit des tiefsten Kulturzustandes in der Welt! Wo Roheit und Selbstsucht in allen Völkern und Ständen herrschen und die geistige Verflachung im Moraste des Materialismus immer giftigere Blasen treibt. Die Schulleitungen sollten doch wirklich, selbst ohne gesetzlichen Zwang, alle, aber auch alle Mittel und Hilfsmittel verwerten, um veredelnde Werke und Gedanken aller Völker zur Erziehung des durch den Krieg verrohten heranwachsenden Geschlechtes nutzbar zu machen und es dadurch auf eine höhere Kulturstufe zu bringen!

Das Kuratorium erkennt auch diese seine Aufgabe, den Volkshochschulhörern die Anteilnahme am Kulturbesitz der gesamten Menschheit zu erarbeiten, ganz richtig. Unlogischerweise schließt es dabei aber eins der wichtigsten Hilfsmittel hierfür, das

vom Forum der Welt nach sorgfältigster Prüfung einstimmig empfohlene Esperanto, kurzzeitig aus, statt es mit Freude zu begrüßen, daß der Deutsche Esperanto-Bund ihm zur Durchführung der Staatspflicht seine Unterstützung anbietet. 23 deutsche Volkshochschulen und 83 Volksschulen haben anders entschieden und schon jahrelang Esperanto mit vorzüglichem Erfolg gelehrt.

Wir Deutschen sind in einer günstigen Lage, denn wir haben eine vorzügliche Übersetzungssprache, eine hochentwickelte Organisation des Buchhandels und ein weitsichtiges Verlegertum. Dieses stellt nun Esperanto immer mehr in seinen Dienst. An der Vermehrung der Esperanto-Literatur, die jetzt etwa 4500 Bände umfaßt, hat es den größten Anteil. Man muß sich nur einmal die neuen Verzeichnisse großer Verleger ansehen, und man wird staunen, was da geschaffen wird. Jeden zweiten Tag erscheint ein neues Esperantowerk, von den größten Wörterbüchern an bis zu den vielgestaltigen Büchern der Übersetzungs- und Originalliteratur. Die besten der 65 periodisch erscheinenden Esperanto-Zeitungen werden in Deutschland verlegt. Bei uns ist die Esperanto-Bewegung am weitesten fortgeschritten, und wir haben durch die deutsche *und* die Esperantosprache die einfachste Möglichkeit, unserem Volke die Weltkulturgüter, soweit sie in der Literatur niedergelegt sind, zugänglich zu machen. Denn das *neutrale* Esperanto ist nach dem internationalen Gutachten der Völkerbundskommission 8—10 mal leichter zu erlernen, als irgendeine andere Fremdsprache, und man erlernt die vollständige Beherrschung desselben, ohne außer Landes gehen zu müssen. Alle Kulturvölker, auch die orientalischen, vermögen Esperanto zu lernen, und sie tun es in stetig und schnell wachsendem Maße, eben um stärker am Weltgeschehen teilnehmen zu können. Besonders die unteren Volksschichten in allen Völkern, denen bisher höhere Kultur- und Sprachenbildung mehr oder weniger vorenthalten wurde, erkennen den ungeahnten Bildungswert dieser weltumfassenden Sprache; deswegen setzt sie sich so schnell und kräftig gegen die widerstrebenden höheren Volksschichten durch, die die Bildung, besonders die klassische, allein zu besitzen behaupten. Nunmehr müssen auch sie gezwungen immer mehr folgen und deswegen verstärkt sich noch der Esperantogebrauch überall. Natürlich geht das bei der Schwerbeweglichkeit einer Volksmasse nicht so schnell. Aber wenn eine einfache, auf keinen materiellen Gewinn ausgehende Sprachbewegung in 30 Jahren sich die Welt erobert, ohne Widerstand zu finden, so muß schon ihre innere Kulturkraft außerordentlich groß sein. Wenn aber alle Völker und Regierungen von ihr ergriffen werden, so muß sie auch in den Volkserziehungsanstalten gelehrt werden. Auch in der Volkshochschule in Mainz.

Aber die Kultur wird nicht nur durch Schrift und Literatur übertragen, sondern auch durch Wort und Tat von Mensch zu Mensch. Zu diesem Zwecke müssen sich jedoch die Menschen untereinander sprachlich verständigen können. Luther mußte erst die deutschen Stämme sprachlich zusammenfassen, ehe er ihnen gemeinverständlich den Kulturwert der Bibel übermitteln konnte. Die ungeheure Menge

und Verschiedenartigkeit der Volkssprachen verhindern aber heute viel mehr als je die Welt-Gemeinverständlichkeit. Man braucht ja nur die fast unüberwindlichen Sprachschwierigkeiten und die daraus folgenden Nachteile der endlosen Friedenskonferenzen und Handelsabmachungen der Jetztzeit zu betrachten, um dies zu erkennen. Die Esperantokonferenzen erreichen ihr Ziel viel schneller, einfacher und sicherer. Auch aus praktischen Gründen fordert der Völkerbund Esperanto, als Radio-, Telegramm- und Handelssprache ebenso wie als Mittel zur Völkerverständigung und Aussöhnung, d. h. eben zur Übertragung von Kultur von Person zu Person. Die Regierungen aller Staaten von buntscheckiger Bevölkerung verlangen es zum Ausgleich sozialer und politischer Gegensätze auf neutraler, sprachlicher Grundlage als Unterrichtsgegenstand in allen Schulen. Heute gehen beispielsweise Hamlet, Nathan, Iphigenie und die Bibel in Meister-Esperantoübersetzungen ebenso in die Geistesadern aller Völker über, wie der ägyptische Kulturroman „Faraono“ und die Anklageschrift des ehemaligen italienischen Ministerpräsidenten Nitti „Europa am Abgrund“. Kultur und Leben pulsen im Esperanto und deswegen gehört es auch in die Volkshochschule in Mainz.

Aber diese sagt ja: Esperanto hat keinen eigenen Kulturwert. Diese Behauptung ist ebenso oberflächlich wie unzutreffend. Esperanto ist aufgebaut auf altem Kulturbesitz, nämlich aus den erprobtesten Sprachenbausteinen und zuverlässigsten Sprachbegriffen einer mehr als 1000jährigen Vergangenheit. Nur Unbeständiges und Entbehrliches sind entfernt. Sowohl die antike wie die germanische Kultur stehen hinter dieser Sprache. Man kann am Esperanto-Wurzelwort den Werdegang des Begriffes und seine Anwendung genau so verfolgen, wie am lateinischen und deutschen. Die geschichtliche Überlieferung steht hinter den internationalen Wörtern; und alle internationalen Wörter sind im Esperanto, denn sonst wäre es eben keine internationale Sprache. Allerdings ein Volk im althergebrachten Sinne mit einer Sonderkultur steht nicht mehr hinter der internationalen Hilfssprache. Wohl aber ein neues, ideal gesinntes und vorwärts strebendes Kulturvolk, das Volk der Esperanto-Bekenner. „Es gibt“ — so schreibt der Völkerbundsbericht — „schon eine ganze kleine Welt, die lebt, arbeitet, korrespondiert, reist und erfolgreich eine neutrale, internationale Sprache verwendet.“ Dieses intelligente Volk, über die ganze Erde verstreut und doch zusammengehalten durch die Bruderidee des Versöhnungs- und Kulturwillens vermittelt einer gemeinsamen Sprache, ist jetzt schon größer und einflußreicher als manche Nation. Und dabei steht es erst am Anfange eines Wachstums, dem territorial keine Grenzen gesetzt sind. Was sind denn 30 Jahre für eine Volksentwicklung!

Man muß sich darüber klar werden, daß die alles umwälzende Neuzeit auch hier etwas Neues gebiert: nämlich ein international denkendes Volk und eine internationale Kultur durch die Wirkung einer internationalen, neutralen Sprache. Das ist etwas ganz Neues! Eine nationale Sprache ist das Abbild der Kultur der zugehörigen Nation, und diese Kultur wird mit all ihren Schönheiten und Fehlern durch diese Sprache übertragen. Die bri-

tische Regierung sagt 1922 in ihrem amtlichen Bericht an den Völkerbund: „Es scheint, daß Esperanto einen schätzbaren Wert für die allgemeine Kultur hat, der bis jetzt noch nicht völlig nutzbringend verwendet ist.“ Und die Pariser Handelskammer stellt in ihrem amtlichen Gutachten fest, daß „in Asien das Streben bei allen Völkern nach der einheitlichen Sprache Esperanto gleichbedeutend ist mit der Notwendigkeit, sich die europäischen Kulturen zu assimilieren, aber ohne sich von derjenigen fremden Nation beherrschen zu lassen, deren Sprache etwa das Übergewicht erlangen würde.“ Dieses Streben macht sich jetzt bei allen selbstbewußten Völkern geltend: man will durch das allgemein zugängliche Esperanto das Gute und das Schlechte in den fremden Kulturen klar und unverfälscht, sicher und ohne Mittelspersonen, Zeitungen usw. selbst erkennen lernen und das Gute zum eigenen Nutzen verwenden. Dies Streben nach internationaler, veredelnder Kultur arbeitet fieberhaft auch im deutschen Volke, denn die Kulturen der Nachbarvölker, die sich schon seit vielen Jahrhunderten immer als deutschfeindlich auswirkten, haben sich in und nach dem Weltkriege wahrlich bei uns keine Freunde erworben, so daß ihre Bekanntschaft über das notwendige praktische Maß hinaus heute schon vielfach nicht mehr als notwendig und erstrebenswert angesehen wird. Dies um so mehr, als die Nachbarvölker deutsche Sprache und Kultur planmäßig verdrängen. Wer sich von uns mit jenen Kulturen und ihren Sprachen aus Sondergründen beschäftigen will oder muß, soll gewiß nicht daran gehindert werden, aber für die allgemeine Volkserziehung sollten wir uns nur auf unsere eigene, germanische Kultur stützen und durch Deutsch und durch Esperanto als Kulturträger und Kulturerzeuger nur das Beste aus der gesamten Weltkultur für uns hinzuerwerben.

Durch das versöhnliche und verständnisvolle Zusammenarbeiten der Menschen entsteht der Kulturfortschritt. Der Weimarer Kreis um Goethe gibt das Beispiel im Kleinen, die großen Esperanto-Weltkongresse zeigen es im Großen. Das Gefühl für Schönheit ist ein allen Kulturen gemeinsames Gefühl. Die klare, vokalreiche Esperantosprache, die so italienisch anmutet, ist schön. In genialer Lösung verbindet sie das klassische Altertum mit der ringenden Neuzeit. Sie besitzt eine unbegrenzte Reichweite und schuf schon eine Originalliteratur von hoher Schönheit. Ihre Eignung zur Veredelung der Menschheit wird eine noch größere schaffen. Weltmenschen und Weltorganisationen bedienen sich heute des Esperanto. Radio und Esperanto sind die epochemachenden, unzertrennlichen Erfindungen der neuen Zeit. Wer sich, tiefer schürfend, mit dem hohen Kulturwerte des Esperanto beschäftigt, wird neben dem „international-praktischen Vorteil“ auch noch die wohltätige Wirkung der herandrängenden „internationalen Kultur“ an sich erfahren.

Deswegen gehört zum Nutzen und zum Wiederaufstieg des deutschen Volkes Esperanto in die Volkshochschulen, auch in die Volkshochschule in Mainz.

Dr. phil. Albert Steche,

Vorsitzender des Deutschen Esperanto-Bundes

Alldeutsche Hetze gegen Esperanto

Im Juni d. J. erschien in zahlreichen deutschen Zeitungen und Zeitschriften die folgende Mitteilung:

Esperanto in Genf

Das internationale Arbeitsamt in Genf hat, um nicht Deutsch als dritte Amtssprache neben Englisch und Französisch einführen zu müssen, den Notbeschuß gefaßt, als dritte Amtssprache Esperanto (!) zu benutzen. Der „Deutsche Esperantist“ (Kefredaktoro Friedrich Ellersieck) begrüßt und entschuldigt diese offenbar deutschfeindliche Maßnahme mit dem törichtesten Hinweis, daß es technisch undurchführbar sei, auch noch Deutsch, Italienisch, Spanisch und eine slawische Sprache neben den offiziellen Sprachen einzuführen. — „Der deutsche Kaufmann im Auslande“ bemerkt dazu mit Recht: In England und Frankreich würde man Leute, die aus einer Liebhaberidee heraus ihr eigenes Volkstum zu schädigen bereit wären, verachten.

Von einer Berliner Zeitung, die ich zu einer Berichtigung der Nachricht veranlassen wollte, erfuhr ich, daß diese einer Korrespondenz entnommen war, die von der Zeitschrift „Der deutsche Kaufmann im Auslande“ (Verlag des Deutschnationalen Handlungsgehilfen-Verbandes in Hamburg) herausgegeben wird. Daraufhin schrieb ich am 23. Juni an die Schriftleitung des D. K. i. A. folgendes:

In der Berliner Zeitung „Der Deutsche“ befand sich vor einigen Tagen eine Mitteilung „Esperanto in Genf“, in der von den Amtssprachen beim internationalen Arbeitsamt in Genf die Rede ist. Es wird dabei auch auf eine Veröffentlichung von mir im „Germana Esperantisto“ bezug genommen, die mir in der Fassung, wie sie wiedergegeben ist, nicht bekannt ist. Nach meinen Erkundigungen bei der Schriftleitung des genannten Blattes soll die Mitteilung von Ihnen übernommen worden sein. Anscheinend handelt es sich um eine als Korrespondenz verbreitete Notiz, die, wie ich erfahren habe, auch in anderen deutschen Blättern erschienen ist. Ich ersuche Sie, mir nachzuweisen, welchem Aufsatz von mir Sie meine angebliche Äußerung entnommen haben. Sollte ich bis zum 30. d. M. keine Antwort von Ihnen erhalten, würde ich mich genötigt sehen, weitere Schritte zu unternehmen.

Hochachtungsvoll F. E.

Die Antwort vom 25. Juni lautete:

Wir erhielten heute Ihre Zuschrift vom 23. d. M. und müssen Ihnen mitteilen, daß der jetzige Schriftleiter unserer Zeitung „Der deutsche Kaufmann im Auslande“ auf einige Tage verreist ist und Anfang Juli zurückkehrt. Der Schriftleiter, der noch die Juninummer fertiggestellt hat, ist inzwischen ausgeschieden, doch haben wir Rückfrage gehalten und bitten Sie, sich einige Tage zu gedulden.

Hochachtungsvoll

Deutschnationaler Handlungsgehilfen-Verband
Abteilung 20 (Ausland)

gez. Schmelzer

Als ich bis zum 28. Juli keine weitere Mitteilung erhalten hatte, schrieb ich an diesem Tage eine Erinnerungskarte an die obige Anschrift:

Ich nehme bezug auf mein Schreiben vom 23. v. M. und auf Ihre vorläufige Antwort vom 25. v. M. In der Annahme, daß Sie nach Verlauf eines Monats die von Ihrem ausgeschiedenen Schriftleiter erbetene Antwort erhalten haben, ersuche ich Sie nunmehr nochmals um möglichst umgehende Erledigung meines Schreibens.

Hochachtungsvoll F. E.

Darauf ging folgende Antwort vom 30. Juli ein:

Auf Ihr Schreiben vom 28. Juli teilen wir Ihnen mit, daß wir die von Ihnen beanstandete Notiz auf Grund Ihrer eigenen Zeitungsmeldung geschrieben haben. Wir glauben, daß unsere Darstellung Ihren Äußerungen durchaus entspricht. Wir stellen Ihnen frei, uns mitzuteilen, was an unserer Meldung falsch sein soll. Gegebenenfalls würden wir selbstverständlich bereit sein, eine Richtigstellung zu bringen.

Hochachtungsvoll

Deutsche Handels-Wacht
Hauptschriftleitung
gez. A. Zimmermann

Darauf meine Antwort vom 1. August an die Hauptschriftleitung der Deutschen Handels-Wacht:

Mit Ihrer Antwort vom 30. v. M. gehen Sie um meine genau gestellte Anfrage vom 23. Juni herum. Ich ersuche Sie nochmals um den Nachweis, in welchem Aufsatz des „Germana Esperantisto“ ich die von Ihnen erwähnte Äußerung getan habe. Mit allgemeinen Redensarten kann ich mich nicht zufrieden geben.

Hochachtungsvoll F. E.

Eine Antwort blieb aus. Ich richtete deshalb am 6. September folgendes Schreiben an die Schriftleitung des Deutschen Kaufmanns im Auslande:

Auf mein Schreiben vom 1. v. M. bin ich bis heute wieder ohne jede Nachricht von Ihnen geblieben. Ich muß daraus schließen, daß Sie nicht in der Lage sind, die Richtigkeit Ihrer derzeitigen Veröffentlichung zu beweisen. Demnach kann ich nur annehmen, daß Sie bewußt mir eine unzutreffende Äußerung zugeschrieben haben. Ich werde den Briefwechsel mit Ihnen veröffentlichen und den Lesern die Kritik über Ihre erbärmliche Handlungsweise überlassen.

Hochachtungsvoll F. E.

li konsentas kun la aŭtoro ĉu ne. Sed — aparte grava akcento sidas sur la fakto, ke la verko prezentas praktikan uzon de Esperanto por politiko, post kiam la aŭtoro kaj la eldonejo konsentis pri E-eldono. — Mi nepre sincere rekomendas la verkon al seriozaj homoj, por kiuj politiko ne estas afero ne tuŝenda: ili legu ĝin! Sed la aliaj, kiuj ne interesigas pri politiko, aĉetu la verkon, por ke la eldonejo vidu ian sukceson kaj sekvigu al tiu ĉi unua libro aliajn similajn; ili ankaŭ povos studi la aplikon de nia lingva instrumento al politikaj ideoj. Karl Minor revizis la tradukon. La malgranda prezo de l' belaspekta libro instigas al aĉeto.

En tiu ĉi okazo mi permesas al mi demandon al kelkaj germanaj samideanoj: Kiam mi eldonis antaŭ unu jaro politikan Bultenon, — kial oni malinvitis min publike por la kongreso en Nürnberg? Ĉu hodiaŭ germanoj havas la liberecon, uzi Esperanton por politiko (la verko de Nitti estas tradukita kaj eldonita de germanoj), sed antaŭ unu jaro praktikemulo estis insultata pro sama ago? — Mi ĝojas, ke fine, fine oni lernis, esti praktika!

Behrendt

***Honorat, André:** La sendanĝereco de Francujo: Tekstoj kaj dokumentoj. (Unu el la problemoj de la paco.) El la Franca trad. Grosjean-Maupin k. a. Paris 1924: L'Idée Française à l'Étranger (Ĉefdeponejo: Esperantista Centra Librejo). [154 p., 12×18,5 cm.] 1.75 Gm.

Ricevinte la belaspektan libron, mi iomete ridetis: Kial Francujo deziras aserti, ke ĝi estas sendanĝera? Kaj mi malfermis la libron, konstatis, ke granda nombro da bone konataj francaj E-istoj kunlaboris en la traduko kaj legis la „Atentigo“-n, t. e. antaŭparolo. Kaj mi miris; oni ne deziras pledi por la sendanĝereco de, sed por tiu al Francujo! Mi preferus paroli pri la sekureco de Francujo! Nu — nepre politika libro, kiu tre kontrastas al la ĉi-supre menciita libro de Nitti. Pri politiko mi ankaŭ ĉi tie ne parolos, sed nur la sola rimarkigo estu permesata al mi: mi ne povas kompreni la hodiaŭan timon de Francujo rilate al ĝia sekureco. Kiu ĝin minacas? La respondon oni povas trovi ĉe Nitti! — Aparte grava akcento sidas sur la fakto, ke la verko reprezentas praktikan uzon de Esperanto por politiko (vidu supre!). Mi treege ĝojus, se mi povus konstati ĉiutage iun similan praktikan uzon de nia lingvo; tio estus la plej certa signo, ke nia afero bone marŝas! Al politikemuloj mi tre rekomendas la libron.

Bchrendt

***Eroŝenko, Vasili:** Turo por fali. Kun japana traduko. Suplemento (!) al „La Verda Ombro“. Julio 1923. Ricevebla de la redaktoro S. Ren, Taikoku, Formoso (Azio). [13 p., 12½×17 cm.] Prezo 1 respondkupono.

[361]

Leginte ĉi tiun broŝureton, mi efektive ne povas fari komplimenton al la tradukinto. Svarmas pli multe da preseraroj en la linioj ol kuloj ĉirkaŭ japana paperlanterno post sufoko varma tago sur la insulo Formoso. Eble la sespaĝa japana teksto estas unuakvalita; sed tion mi ne povas kontroli. Gravaj gramatikaj eraroj kaj strangaĵoj — certe japanismoj — plialtigas (!) la ĝuon de la legado.

M. Butin, L. K.

***Koncerta Kantaro.** 1a Parto. Simplaj kantoj kun facila akompano de fortepiano. Eldonita de P. C. Brederode kaj K. Veldkamp. Tradukinto de la tekstoj: Jan Ziermans. Groningen (Holando) [1923]: Eldonejo P. Nordhoff. (80 p., 20,5×28 cm.) Broŝ. 5,— Gm., bind. 7,— Gm.

[388]

Tiu ĉi kantaro enhavas 38 kantojn de famaj komponistoj kiel Beethoven, Mozart, Haydn, Mendelssohn, Schubert, Schumann, Franz, Löwe kaj multaj aliaj. La traduko estas tiel prosperinta, ke la teksto estas tre bone kantebla. La tradukinto dividis la vortojn ne laŭ silaboj, sed laŭ la vortelementoj (radikoj kaj afiksoj). Tial la teksto estas ankaŭ facile komprenebla por neesperantistoj. — Sur paĝo 52 oni legas: „Her Hajnrîh“. La vorto „sinjoro“ estas tradukita per „Her“. Kial? sendube mal-komprenajo! —

Tiajn kantarojn ni bezonas tre necese; ili helpas Esperanton disvastiĝi ofte pli ol rekta propagandklopodo; tial la „Koncerta Kantaro“ estu rekomendata. Okaze de Esperanto-festoj oni certe povos uzi ĝin.

W. W.

***Gvidilo** tra Bialystok, la naskurbo de Dro Zamenhof. Horrem bei Köln (Germ.) 1923: Esperanto Triumfonta [26 p., 11,5×17,5 cm.] 0.20 Gm.

[368]

Tre rekomendinda legaĵo por ĉiu Esperantisto. La libreto enhavas unue la historion de Bialystok (elp. Bjaŭistok), prilaborita de J. Šapiro, E. L. A. ekssekretario de la urbo B., poste historiajn dokumentojn (paĝon 24 de la libro por enskribo de naskiĝintaj hebreeoj en la jaro 1859, kaj la protokolon de la urba komitato pri nomigo de unu el la stratoj de la urbo „strato de Zamenhof“) kaj fine gvidilon tra la urbo. Ses bildoj montras al ni la aspekton de la urbo, kie naskiĝis nia Majstro; inter ili ni trovas la Zamenhof-an straton kaj la Realan Lernejon — nun gimnazion — en kiu lernis nia Majstro.

Laŭ la antaŭparolo la broŝuro volas „servi al ĉiu samideano kiel informilo pri Bialystok kaj al ĉiu vizitanto kiel gvidilo tra tiu ĉi urbo“, tasko, kiu certe estos plenumata.

La preso estas klara, la stilo bona. Sur p. 11 antaŭlasta linio mi trovis preseraron: adminiot rsaden (anst. administrado en).

Goho

***Zanoni:** Kiel akiri bonan stilon? Berlin 1923: Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H. 5a 6a miloj [8 p., 9½×14 cm.] 0,05 Gm.

[340]

La bonecon kaj taŭgecon de ĉi tiu eta lernilo kaj gvidilo pruvas la nova eldono. Ĝi servu al ĉiu serioza samideano kaj necesigu baldaŭ pluajn represojn. Pro ĝia malkareco grupoj mendu ĝin grandkvante por disdonado inter la kursanoj; bona rezulto ne mankos.

M. Butin, L. K.

Unger, Hj.: Albanio. Horrem 1923: Internacia Komercio [15 p., 12×18,5 cm.] 0.20 Gm.

[369]

Priskribo de la malgranda lando Albanio speciale de la ekonomia vidpunkto. La studado de tiu ĉi broŝureto estas tre interesa. Menciinda por ni estas la fakto, ke Esperanto estas en la programo de la pli altaj lernejoj.

Stilo, preso kaj papero estas bonaj. Preserarojn mi ne trovis.

Goho

* **Hiller, Feliks:** Ho, tiuj fremduloj! Opereto en unu akto, originale en Esperanto verkita. (Esperanta Librotrezoro N-o 3) Bialystok 1923: Eldonejo J. Šapiro. [50 p., 12×17 cm.] 0,70 Gm. [373

En rondo de gajaj samideanoj tiu ĉarma kaj ridiga komedioto estos volonte ludata. Ses personoj sufiĉas por la prezentado; la rolo de servisto estas ludebla de unu el la seso. Gajigaj kantoj, valsoj kaj marŝoj, kiujn la aŭtoro mem komponis, agrable subtenas viglan ludon. — En la bonstila verkita teatraĵo mi trovis unu preseraron (p. 18) kaj du gramatikajn erarojn (p. 14 neebla anstataŭ neeble, p. 15 malebla anstataŭ maleble). — Al ĉiu festemaj grupoj rekomendinda. *M. Butin, L. K.*

* **Bulthuis, H. J.:** Malriĉa en spirito. Originala teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto. Reviziita de Zanoni. Horrem 1923: T. & H. Jung [66 p., 12×18 cm.] 0,50 Gm. [389

La enhavo de tiu ĉi teatraĵo estas kortuŝa. Patrino havas du filojn. Unu el ili fariĝis idiota okaze de falo de sur fumturo, kiun li estis riparanta. Lia spirito ne plu pliboniĝis. Li restis, kiel diris la patrino laŭ la Biblio, malriĉa en spirito. La alia filo fariĝis soldato kaj militiris Rusujon. Ĉar la milito ne estis afero de la popolo, sed nur de la imperiestro, li ne volis oferi sian vivon kaj forkuris. Li estis kaptata kaj ĵetata en la arestejon. La milita konsilantaro kondamnis lin je morto. Mallonge antaŭ la ekzekutado li ricevis permeson de la serĝento de la arestejo por adiaŭi sin de siaj parencoj. Li estis doninta al la maljuna serĝento la honorvorton, ke li revenos je preciza horo. Se li ne revenas, la serĝento devas suferi la morton por li. La patrino volis malebligi la reiron kaj miksis en trinkajon narkotilon. Patrino kaj li ekdormas. La idiota filo ĉion estis kompreninta. Por savi la fraton li surmetas lian uniformon, kiun la frato estis demetinta kaj iris en la kazernon. Li estis kondukata al la ekzekutejo. Neniu rimarkis la trompon. Li svenas, la kugloj traboras la muron. Post kiam li rekonsciĝis, oni konstatas, ke li estas freneza, laŭ ilia opinio pro teruro. La konsilantaro pardonis kaj eksigis lin el la milita servo pro frenezo. Li hejmen iris — la frato estis savita.

Jen mallonga resumo. Legu mem la teatraĵon, ĝi estas vere leginda. La preso estas tre klara, la stilo bonega. Mi trovis nur kelkajn preserarojn, kiuj ne ĝenas la legadon. *Goho*

* **Koch, Hans:** Albrecht Dürer. Vivo kaj verkado de la fama pentristo. 28 bildoj pri liaj verkoj kun biografio kaj klarigoj. Deise hofen 1924: Sudgermana Esperanto-Eldonejo Oskar Ziegler. [48 p., 14,5×22,5 cm.] 1,40 Gm. [422

Jam antaŭ la milito grandformata verko pri Albrecht Dürer (en Esperanto) estis elĉerpita. Ni do salutis la aperon de nova, iom pli malgranda, sed ne malpli bela libro, kiu donas sur luksa papero biografiajn notojn kaj multajn ilustraĵojn de la plej bonaj laboroj de la germana majstro, tuĉ-kaj akvareldesegnaĵojn, olepentraĵojn, kupro-kaj lignogravuraĵojn. — La eldono estas zorgeme farita, sed estas bedaŭrinde, ke tia libro ne estas tute ĉirkaŭtrancita. Tia ŝparemo ne estas laŭdinda. — La ĉarma verketo sendube trovos la plaĉon de la tuta Esperantistaro. *M. Butin, L. K.*

* **Möbusz, A., Studiendirektor Dr.:** Vollständiges Lehrbuch der Welthilfssprache Esperanto. Kurzer und leichtfaßlicher Lehrgang für den Kursus- und Selbstunterricht. Fünfte, verbesserte Auflage. Berlin 1924: Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H. [136 S. und 1 Bild, 14,5×22 cm.] 2,— M [427

La fakto, ke de la recenzota lernlibro nun aperas la 5a eldono, verdire superfluigas ĉiun kritikon. Pli efike oni ne povas prui la altan valoron kaj la praktikan taŭgecon de la instruverko. Estas preskaŭ kutimo, diri anoncante novan lernlibron: Jen unu el la plej bonaj de ĉiuj ĝis nun aperintaj. Do, mi evitas ĉi tiun frazon kaj preferas, denove montri kaj akcenti la superecon de la verko.

La aŭtoro, kies nomo ne nur en la rondoj Esperantistaj, sed ankaŭ en la pedagogia mondo havas belan sonon kaj vekas fortan eĥon, majstre gvidas la lernemajn komencantojn sur la plej mallonga vojo al celo nepre realigebla, kiun la antaŭparolo formulas per jenaj vortoj: Scipovo de la lingvo Esperanto kaj kapablo, plej baldaŭ kiel eble partopreni aktive la multflankan, interesan vivon Esperantistan de la nuntempo (ekzameno pri kapableco!).

Ĉi tiu celo destinas la vojon. Nur dek kvar lecionojn enhavas la tuta kurso. Dialogoj el la ĉiutaga vivo (de la alveno en fremda urbo ĝis la forvojaĝo) estas la tekstoj montrantaj kaj klarigantaj la regulojn de la vortfarado kaj gramatiko. Riĉa ekzercadmateriale estas alligata. Ne necesas diri, ke la aŭtoro aplikas la direktan metodon. Mi ĝoje mencias la tre klaran, precizan germanan tekston klarigantan. Same grava estas la intenco, elmontri per komparo kiel eble plej ofte la parencecon de la Zamenhof-aj vortfarad-elementoj kun tiuj de naciaj lingvoj. Nur tiamaniere oni sukcesas konvinki pri la fakto, ke Esperanto meritas lokon flanke de la vivantaj lingvoj, ke la kontraŭuloj eraras, se ili rigardas E-on nur kiel artefaritan eltrovon sen iu vivpovo. *Dro Tr.*

Esperanto-Danc-Kanto

En la matena numero de la 8a de Novembro de „Berliner Tageblatt“ troviĝis en la muzika aldono *Esperanto-Danc-Kanto* (Shimmy) en germana lingvo kaj en la Esperanto-traduko de Dro *Kliemke*.

La eldonoj Rudolf Mosse estas preta, permesi al ĉiuj Esperanto-gazetoj, internaciaj kaj naciaj, la senpagan represon de tiu ĉi original-kanto, sub jenaj kondiĉoj:

- 1) Oni citu, ke la eldonoj Rudolf Mosse, Berlin, donis la permeson por la publikigo.
- 2) Oni sendu post la publikigo unu ekzempleron al la eldonoj *Rudolf Mosse, Berlin, Jerusalem Str. 46/49*.

Ankaŭ la traduko de la Esperanta teksto en nacilingvon estas permesita.

Plian ekzempleron de la eventuala publikigo oni bonvolu sendi al la subskribinto.

La eldonoj Rudolf Mosse intencas, sendi cent ekzemplerojn de tiu ĉi Esperanto-Kanto al Esperantistoj kaj Esperantaj gazetoj de ekster-kaj enlandoj, kies adresojn ni transdonos al la eldonoj.

J. Glück,

Berlin W 35, Potsdamer Str. 113, Haus V.

Mitteilungen des Deutschen Esperanto-Bundes (Eingetr. Verein)

Geschäftsstelle: Nürnberg, Albrecht-Dürer-Platz 6 — Für die Mitteilungen verantw.: Max Hönigsberger
 Postscheckkonto: Nürnberg Nr. 10500

An die deutschen Kaufleute!

In letzter Zeit sind mehrfach von Fabrikanten und kaufmännischen Kreisen eingehende Erkundigungen über Esperanto eingezogen worden.

Daraus geht hervor, daß Interesse für Esperanto vorhanden ist.

Sollen diese Firmen jedoch endgültig für die Esperantosache gewonnen werden, so begegnet man Einwendungen, die da lauten: „Wir haben noch keine Esperantobriefe erhalten“, oder „Wenn wir ein Schreiben in Esperanto herausgeben, so sind wir nicht sicher, daß der Inhalt verstanden wird, eine Befürchtung, die bei Verwendung der deutschen Sprache doch kaum vorhanden ist“.

Um diese Einwendungen wenigstens einigermaßen zu beseitigen, wäre es Pflicht jedes esperantistischen Kaufmanns, ganz gleich, ob er einen Brief in Esperanto oder in einer anderen Sprache hinaussendet, daß er durch einen besonderen Vermerk auf die Möglichkeit hinweist, im Verkehr mit ihm Esperanto zu gebrauchen.

Deshalb ersuchen wir alle Gruppenvorstände, unter ihren Mitgliedern, soweit Kaufleute in Frage kommen, hierauf besonders aufmerksam zu machen und die Kaufleute zu veranlassen, auf ihre Briefbogen entweder den Esperantostern oder Redewendungen, wie „Esperanto korespondata“, „Esperanto uzata“ o. ä., drucken zu lassen.

Damit wäre das äußere Zeichen gegeben, daß diese Geschäftsleute Esperanto anwenden.

Weiterhin ist es aber wichtig, die Anschriften aller der Firmen und u. a. auch der Angestellten in den Firmen zu erfahren, die Esperantokorrespondenz in einwandfreier Weise auszuführen in der Lage sind, damit man auf Grund des so erhaltenen Verzeichnisses in den verschiedenen Orten Firmen namhaft machen könnte, die eingelaufene Esperantobriefe den nicht Esperanto beherrschenden Firmen übersetzen könnten und die in Informationsfällen rein kaufmännischer Art die nötige Auskunft zu erteilen vermögen.

Wäre diese Statistik in Deutschland erschöpfend zusammengestellt, so könnte man sie zuverlässigen esperantistischen Kaufleuten als Werbematerial zur Verfügung stellen. Wenn im Ausland die Angelegenheit gleichermaßen behandelt würde, so hätte man in verhältnismäßig kurzer Zeit in bescheidenen Umfängen das erreicht, was die esperantistische Kaufmannschaft schon lange anstrebt.

Wir richten deshalb sowohl an alle Gruppenvorstände als Mittelpersonen, als auch an alle esperantistischen Geschäftsleute Deutschlands die Bitte, der Bundesgeschäftsstelle möglichst bald ihre Anschriften einzusenden mit der Angabe, ob der Geschäftsinhaber selbst oder seine Angestellten in der Lage sind, in Esperanto zu korrespondieren und ob sie gewillt sind, einen etwa später zu besetzenden Delegiertenposten in ihrer Stadt zu übernehmen.

Beitragsleistung. Nachdem der Bund dem Verlag des G. E. gegenüber die Verpflichtung übernommen hat, die an die Gruppen gelieferten Stücke des G. E. zu bezahlen und dieser Verpflichtung pünktlich nachkommen muß, seien die Gruppen an dieser Stelle eindringlichst ermahnt, pünktlich ihre Beiträge an den Bund zu entrichten, damit der Bund selbst seinen Verpflichtungen nachkommen kann.

Gruppenbewegung. Neu zum Bunde haben sich angemeldet Ortsgruppen in Berching, Hattingen (Progreso), Recklinghausen. Als Einzelmitglieder sind beigetreten die Herren: Paul Schettler, Rudolstadt; Ernst Geyer, Erfurt; Herrmann Madlener, Gaustadt, Kurt Ebert, Lengenfeld i. V.; Leopold Riedinger, Nürnberg; Rudolf Hobitz, Oels (Schles.).

Presse-Ausschuß. Bis 15. November waren 65 Pressewarte gemeldet. Damit ist zwar die Zahl um Doppelte gestiegen, beschämend bleibt aber immer noch die Tatsache, daß 100 Gruppen sich nicht ihrer Pflicht bewußt sind. Und auf diese Weise soll die Bewegung wachsen und die deutsche Presse gewonnen werden?!

Es wird bestimmt erwartet, daß folgender Anforderung *sofort* entsprochen wird: Die Bewegung „Radio und Esperanto“ ist in der Entwicklung begriffen. Es muß deshalb hier sofort das gesamte periodische Schrifttum erfaßt werden, wenn ein Erfolg erzielt werden soll. Deshalb erläßt der Presseleiter an die Gruppen, in deren Orten eine Radiozeitschrift erscheint, den dringenden Aufruf, bis Ende Dezember 1924 den Titel, Redakteur, Verlag und Ort und die Erscheinungsweise zu melden, gleichzeitig auch ein Mitglied, das diese Zeitschrift peinlich auf alle welthilfssprachlichen Notizen und Artikel beobachtet.

Eine andere dringliche Angelegenheit: Der Presseleiter ist nun bereits mehrmals peinlich berührt gewesen, daß er als offizielle Pressestelle des Bundes von deutschen Veranstaltungen oder Erfolgen nichts erfahren hat. Die Folge ist natürlich jedesmal, daß die „Presse-Korrespondenz“ die aktuellsten Sachen prompt vier Wochen zu spät melden kann. Eine Postkarte macht sich entschieden gut bezahlt. Im gegebenen Falle wird der Bund auch gern die Kosten ersetzen. — Wenn ein internationaler Pressedienst der Esperantisten ins Leben gerufen werden soll, dann muß erst recht der nationale Presseleiter gut bedient werden.

Die „Presse-Korrespondenz“ geht künftig in einem Exemplar der Gruppe für die Akten zu mit Zusendung des G. E., die Pressewarte erhalten die benötigten Stücke von der Pressestelle direkt kostenlos zugesandt.

In der Berichtszeit wurden von 23 Orten — oft mehrmals — Zeitungsausschnitte für die Statistik zugesandt. Es wird gebeten, bis 15. Dezember das verfügbare Material einzusenden, damit die Jahresübersicht möglichst vollständig im Januarheft des G. E. gemeldet werden kann.

Satzung des Deutschen Esperanto-Bundes, E. V.

(Genehmigt in der Hauptversammlung zu Pfingsten 1922 in Breslau und geändert lt. Beschlusses der Hauptversammlung in Plauen 1924)

I. Name, Sitz und Geschäftsjahr

§ 1

Deutscher Esperanto-Bund, E. V. (Germana Esperanto-Asocio), abgekürzt: G. E. A., als Verein eingetragen in das Vereinsregister des Amtsgerichts Dresden am 28. Juli 1906. Sitz: Nürnberg.

Das Geschäftsjahr läuft vom 1. April bis zum 31. März.

II. Zweck

§ 2

Zweck des Bundes ist die Ausbreitung der Welthilfssprache „Esperanto“ nach dem „Fundamento de Esperanto“ von Dr. L. L. Samenhof.

Die Verfolgung parteipolitischer, rassenpolitischer und religiöser Ziele ist ausgeschlossen.

III. Mitglieder

§ 3

Der Bund setzt sich zusammen aus

a) ordentlichen Mitgliedern:

1. Ortsgruppen von mindestens 5 Mitgliedern
2. Einzelmitgliedern (Izoluloj), d. h. Esperantisten, die keiner Gruppe angehören,
3. korporativ angeschlossenen Verbänden,
4. Ehrenmitgliedern;

b) außerordentlichen Mitgliedern (Förderern ohne Stimmrecht): Nichtesperantisten, Firmen, Körperschaften, Vereinen.

§ 4

Ehrenmitglieder werden auf Vorschlag des Vorstandes vom Bundestag ernannt und genießen die Rechte der ordentlichen Mitglieder.

IV. Erwerb der Mitgliedschaft

§ 5

Die Anmeldung geschieht beim Vorstände, der über die Aufnahme endgültig entscheidet.

V. Erlöschen der Mitgliedschaft

§ 6

Die Mitgliedschaft erlischt:

1. durch Tod oder Auflösung,
2. durch freiwilligen Austritt mit Schluß des Geschäftsjahres (die Kündigung ist dem Geschäftsführer mindestens 3 Monate vor Ablauf des Geschäftsjahres schriftlich anzuzeigen),
3. durch Ausschluß seitens des Vorstandes. Der Ausschluß geschieht, wenn das Mitglied seinen Verpflichtungen gegen den Bund nicht nachkommt oder absichtlich gegen seine Interessen verstößt. Vorherige Verwarnung ist erforderlich, Berufung innerhalb 6 Wochen an den Bundestag zulässig.

Ausgeschiedene Mitglieder haben keinerlei Ansprüche an das Bundesvermögen, aber rückständige Beiträge zu bezahlen.

VI. Landes- und Gauverbände

§ 7

Die Ortsgruppen haben die Pflicht, sich zu Landes- oder Gauverbänden zusammenzuschließen. Alle diesen Verbänden angeschlossenen Gruppen, die mehr als 5 Mitglieder haben und länger als ein Jahr bestehen, müssen ordentliche Bundesmitglieder werden. Die Bezirksgrenzen sind, ebenso wie geplante Verbandstagungen und größere, nach außen wirkende Veranstaltungen, im Einvernehmen mit der Bundesleitung festzusetzen.

VII. Beiträge

§ 8

1. Die Ortsgruppen zahlen für jedes ihrer Mitglieder einen einfachen Jahresbeitrag von 1.20 M, zu dem entsprechend den jeweiligen Verhältnissen und Bedürfnissen halbjährlich vom Vorstände Zusätze neu beschlossen werden.

2. Die Einzelmitglieder (Izoluloj) zahlen an Orten, wo keine Gruppen bestehen, das *Dreifache* dieses Beitrages, wo aber Gruppen bestehen, denen sie beitreten sollten, das *Vierfache*.

3. Die korporativ angeschlossenen Verbände zahlen einen besonderen, ebenfalls jährlich vom Bundestage festzusetzenden Beitrag.

4. Ehrenmitglieder sind von Bundesbeiträgen befreit.

5. Die Beiträge der **außerordentlichen Mitglieder** sind der Vereinbarung mit dem Vorstände überlassen.

Alle ordentlichen und außerordentlichen Mitglieder erhalten je ein Exemplar der Bundeszeitung unentgeltlich geliefert.

VIII. Organe

§ 9

Organe des Bundes sind:

1. der Vorstand,
2. der Beirat,
3. der Bundestag (Hauptversammlung).

IX. Der Vorstand

§ 10

Der Vorstand besteht aus 3—7 Mitgliedern:

1. dem Vorstand,
2. dessen 1. Stellvertreter,
3. dessen 2. Stellvertreter,
4. dem Geschäftsführer,
5. dem Kassenwart und etwaigen Beisitzern.

Der Vorstand führt die Geschäfte des Bundes und vertritt ihn nach innen und außen. In Abstimmungen entscheidet bei Stimmgleichheit der Vorsitzende. Die Vorstandsmitglieder versehen ihr Amt ehrenamtlich. Ihre Auslagen werden ihnen im Rahmen des Haushaltsplanes ersetzt. Alle dem Bund rechtlich verpflichtenden Schriftstücke bedürfen außer der Unterschrift des Vorsitzenden noch der eines zweiten Vorstandsmitgliedes.

§ 11

Der Vorstand wird in der Hauptversammlung (Bundestag) durch einfache Mehrheit in 5 getrennten Wahlgängen auf die Dauer von 3 Jahren gewählt. Wiederwahl ist zulässig, ebenso Wahl durch Zuruf, falls Widerspruch nicht erhoben wird. Scheidet innerhalb der Amtsdauer ein Mitglied des Vorstandes aus, so wählt der Beirat einen Ersatzmann für die Zeit bis zur nächsten Hauptversammlung.

X. Der Beirat

§ 12

Der Beirat besteht aus 6 Mitgliedern, die von der Hauptversammlung gewählt werden. Hinzutreten je ein Vertreter jedes Landesverbandes. Die Amtsdauer beträgt 3 Jahre.

Der Beirat wählt sich seinen Vorsitzenden selbst und hat die Aufgabe, den Vorstand bei seiner Tätigkeit zu unterstützen, die Hauptversammlungen und Tagungen vorzubereiten und die Ausführung der dort gefaßten Beschlüsse zu überwachen.

Er kann auf Grund einstimmigen Beschlusses die Einberufung einer Hauptversammlung beantragen, wenn Vorstandsmitglieder ihre Pflichten verletzen oder den Bund offenkundig schädigen. Falls der Antrag vom Vorstand abgelehnt wird, kann der Beiratsvorsitzende selbständig eine Hauptversammlung mit dem Antrage auf Amtsentsetzung und Ersatzwahlen einberufen.

Der Beirat faßt seine Beschlüsse in der Regel durch schriftliche Abstimmung mit einfacher Mehrheit, wobei angenommen wird, daß dasjenige Mitglied, das innerhalb einer Woche seine Stimme nicht abgibt, sich ihrer enthält. Eine Sitzung ist beschlußfähig, wenn mindestens ein Drittel der Beiratsmitglieder anwesend ist. Beschlüsse werden mit einfacher Mehrheit gefaßt. Bei Stimmengleichheit gilt ein Antrag als abgelehnt. Ist eine Sitzung beschlußunfähig gewesen, so darf ein Beschluß auf schriftlichem Wege nachträglich herbeigeführt werden.

XI. Die Hauptversammlung (Bundestag)

§ 13

Die Hauptversammlung findet alljährlich innerhalb der Zeit von April bis August statt. Sie entscheidet endgültig über alle Fragen, die der Vorstand oder der Beirat nicht erledigen können. Die Berufung der Hauptversammlung geschieht durch den Vorsitzenden. Der Zeitpunkt des Zusammentrittes ist mindestens 2 Monate, die Tagesordnung mindestens 1 Monat vor der Versammlung bekanntzugeben.

§ 14

In der Hauptversammlung besitzen nur die ordentlichen Mitglieder ein Stimmrecht; die Ausübung desselben ist gebunden an die vollständige Zahlung des Bundesbeitrages für das laufende Geschäftsjahr.

Die Ortsgruppen haben für je angefangene 10 Mitglieder 1 Stimme.

Das Stimmrecht der korporativ angeschlossenen Verbände regelt sich jeweils nach dem Verhältnis der gezahlten Beiträge.

Das Stimmrecht für die Gruppen und Verbände üben bevollmächtigte Abgeordnete aus, die ihre Vollmachten vor der Eröffnung der Hauptversamm-

lung dem vom Bundesvorsitzenden zu ernennenden Prüfungsausschuß (1 Vorsitzender, 2 Schriftführer) zur Eintragung vorlegen müssen.

Unvertretene Gruppen und Verbände haben das Recht, nach eigenem Ermessen ihre Stimme und damit die Wahrnehmung ihrer Rechte dem Vorstände oder anwesenden Abgeordneten zu übertragen.

Keiner derselben darf aber mehr als 10 fremde Stimmen vertreten.

§ 15

An den Verhandlungen der Hauptversammlungen dürfen außer den Abgeordneten auch andere Bundesmitglieder, Angehörige von Ortsgruppen und widerruflich die vom Vorstand oder Beirat besonders geladenen Gäste teilnehmen, jedoch haben sie kein Stimmrecht.

§ 16

Die Beschlüsse werden, soweit nicht für Einzelfälle besondere Bestimmungen gelten, durch einfache Stimmenmehrheit gefaßt.

Bei Stimmengleichheit entscheidet der Leiter der Versammlung.

Während der Hauptversammlung gestellte Anträge dürfen nur zur Verhandlung kommen, wenn kein Widerspruch dagegen erhoben wird. Sie bedürfen zur Annahme einer Mehrheit von zwei Dritteln der in der Hauptversammlung vertretenen Stimmen.

§ 17

Anträge für die Tagesordnung müssen bis sechs Wochen vor der Jahreshauptversammlung bei dem Bundesvorsitzenden eingereicht werden.

Die Jahreshauptversammlung verhandelt über die Tagesordnung, den Haushaltplan, die Entlastung des Vorstandes und Schatzmeisters; sie nimmt die erforderlichen Wahlen, darunter die zweier Rechnungsprüfer, vor und bestimmt den Ort der nächsten Jahreshauptversammlung.

§ 18

Die Verhandlungsniederschrift ist vom Leiter der Versammlung und einem der Schriftführer zu unterzeichnen.

Alle Beschlüsse sind innerhalb 6 Wochen in der Bundeszeitung zur Kenntnis der Mitglieder zu bringen und erlangen damit verbindliche Kraft.

XII. Satzungsänderungen

§ 19

Eine Änderung der Bundessatzung kann nur mit der Zweidrittel-Mehrheit einer Hauptversammlung beschlossen werden.

XIII. Auflösung

§ 20

Die Auflösung des Bundes darf nur geschehen, wenn in einer eigens zu diesem Zwecke einberufenen Hauptversammlung, zu der mindestens 3 Monate vorher die Einladungen ergehen müssen, in namentlicher Abstimmung dreiviertel der vertretenen Stimmen dafür eintreten. Diese Hauptversammlung beschließt zugleich über die Verwendung des vorhandenen Bundesvermögens.

Esperanto-Praktiko

Instrua kaj literatura gazeto por perfektigo en la Lingvo Internacia

6 a Jaro
No. 12 (72)

Fondinto kaj Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek
Respondeca redaktoro: Arnold Behrendt

Decembro
1924

Poŝtidilio

Ŝercrakonto de Paul Keller

La tri somergastoj de la soleca montarvilaĝo jam forveturis en Aŭgusto...

„Kio do?“ pensis la pasero ĉirkaŭ la fino de Septembro: „mi agos kiel dum la antaŭa vintro: mi eknestos en la poŝkesto. La poŝkesto estas bona, forta dometo, pli fortika ol jenaj ventemaj sturnokestoj... krom tio: neniu ĝenos min.“

Li do priparolis la aferon kun sia edzino.

„Kiel malsaĝe! Lado estas tro malvarmiga!“ ŝi diris.

„Ne babilaĉu malsaĝe, virino!“ diris la viro indigne. „Lado estas forta; jen la ĉefa afero! Sekve: en la keston ni iru, for!“

Poste ili rampis tra fendo, super kiu estis skribite „por enmetado“ kaj ĉirkaŭrigardis en la kesto. Ĉarma dormoĉambro, heligita per blueta lumo. Malsupre oni vidis malgrandan ŝildeton, kvazaŭ travideblaĵon: tie estis skribite „Sabaton“*).

„Edzo, jen io kuŝas!“ diris la edzino. Estis dika letero, sur kiu estis ruĝe skribita „Urĝa“.

„Tiu estas bona“, respondis la edzo; „ĝi estas dika kaj mola kiel matraco.“

Poste ili elflugis, ŝtelis pajlon, ŝtelis fojnon, deŝiris muskon kaj kolektis foliaron, kaj baldaŭ la loĝejo estis bone provizita. Kiam ekvesperiĝis kaj la vento sovaĝe fajfis, la paserparo bonhumore sidis en sia forta domo kaj aŭskultis kun granda plezuro la pluvon gutantan sur la tegmenton de la paserhejmo.

Dum la sama vespero la teksisto Bieselt, je kies domo la poŝkesto estis pendigita, sidis en malproksima biertrinkejo, je tri kvaronoj da horo malsupren de la monto. Kaj la leterdisportisto regalas lin per glaso da brando kaj diris:

„Nu, Bieselt, se efektive en tiu ĉi vintro iu ajn enmetos leteron en la poŝkeston je via domo, sciigu min pri ĝi; poste mi venos por elpreni, ĉar — devo estas devo.“

Kaj dirante ĉi tion, la leterdisportisto montris tre laŭficistan, decideman mienon.

La paseroj bonfartis. La nutraĵo ja estis mizera, sed la domo estis belega. — Sed iam, en trankvila nokto, kiam ambaŭ dolĉe dormis, ili aŭdis mallaŭtajn paŝojn... mano palpis je la poŝkesto... oni aŭdis spiregon... poste letero falis tra la fendo kaj ĝuste trafis ta terurplenajn geedzojn.

* Ĉu ĝi estas forgesita kalendaro aŭ sciigo pri la tago, kiam venos la poŝtisto, por elpreni eble enmetitajn leterojn? — (Noto de la tradukinto)

„Kia malnoblaĵo!“ ekinsultis la paserviro, kiam li refariĝis trankvila post la granda emocio, „mi devas vidi, kiu jen estis.“

Li elflugis por esplori kaj baldaŭ revenis.

„La nigra Linjo, la malsaĝa anserino! Al ŝi enkapiĝis tiu soldato, la dragono, kiu havis liberpermeson dum la rikolta tempo; kaj nun ŝi skribas al li! Ĉu tio ĉi estas deca?“

„Ne, ne!“ la paserino nee balancis la kapon; „tio ja nepre ne decas!“

Poste la paserviro piede batis kolerege la leteron kaj diris:

„Helpu, edzino! Ni suben ŝovu la leteron!“ Kaj ili tiel faris.

Post dek tagoj, en silenta nokto, je la dua fojo, letero englitiĝis tra la fendo. La paseredzo furioziĝis, elflugis por esplori kaj baldaŭ revenis.

„La Huberino, la maljuna hominaĉo, certe ŝi skribis al sia mondoninto, ke ŝi ne povas pagi la procentojn! Helpu, edzino! Ni suben ŝovu la leteron!“

Kaj ili tiel faris.

Jam la sekvantan vendredon, en trankvila nokto, ankoraŭ unu fojon letero glitis tra la fendo. La paseredzo certe krakigus la dentojn, se li havus ilin; li elflugis por esplori kaj baldaŭ revenis. Li estis paliĝinta pro kolerego:

„La Hejniŝa Lenjo, la ŝafino, skribas ankaŭ al la dragono, kiu havis liberpermeson por la rikolto.“

Kaj tre kolerege kaj indigne ili ambaŭ laŭkutime suben ŝovis la leteron.

Sed post du tagoj jam ree letero venis tra la fendo kaj mallaŭta voĉo diris ekstere: „Ke nur neniu min vidu!“

„La vilaĝo malsaniĝas je skribfrenezeco!“ ekkriis la paseredzo; li elflugis por esplori kaj sciigis la edzinon, ke estis la Steinertino, kiu sendas al sia filo monleterojn, dirinte pri tio nenion al sia edzo.

Ĉirkaŭ la fino de Novembro eĉ alvenis infaneto, kiu sur la kapon de la gepaseroj jetis leteron al la Kristinfano; ĉion ili suben kaŝis.

Sed kiam, meze de Decembro, la Hibnera Frinjo ŝtelaliris kun letero al la dragono, kiu havis liberpermeson por la rikolto, tiam la paseredzo sovaĝe furioziĝis. Li ekdisŝiris la kuŝejon, malenfosetis leteron post letero kaj eksterenjetis ĉiujn leterojn, kun helpo de sia edzino, tra la fenda malfermaĵo.

La sekvantan matenon la teksisto venis el sia domo, vidis la multajn leterojn, kuŝantajn sur la neĝo, reŝovis ĉiujn leterojn en la keston kaj post tri tagoj li irigis rapidsenditon al la leterdisportisto. Tiu ĉi venis jam antaŭ la fino de la semajno por malplenigi la keston. Sed jam antaŭ tiu mo-

mento la gepaseroj forloĝigis, ĉar per la paperamaso, kiun la teksisto enĵetis en la keston, ili estis preskaŭ dispremitaj.

La leterdisportisto malplenigis la keston, vidis la amason da pajlo, da fojno, da plumoj, da musko kaj kelkajn postsignojn de la paseroj kaj diris, laŭ-oficiste rigardante la teksiston:

„La enĵetado de neleteraĵoj en publikan poŝtkeston estas malpermesita.“

La teksisto nenion respondis, sed la paseredzo opiniis:

„Nuntempe la vulturo bonvolu esti pasero!
Eĉ ne en poŝtkesto oni restas sen ĝeno!“

(*Lingvo Internacia*, Decembro 1911)

El la germana lingvo,
kun speciala permeso de l' aŭtoro, tradukis
Behrendt

El grekaj papirusoj

Komunikita de Dro J. Penndorf

Orakolaj demandoj

Kiel nuntempe servistinoj aŭ iom maljunaj fraŭlinoj — sed ne nur tiaj — en timigaj akcidentoj kaj precipe en amaj aferoj volonte rifuĝas al proksima profeto aŭ eĉ kartdivenistino, tiel iam oni sin turnis kredeme al la loka sanktulo aŭ iu demono. Papiruso Rainer, tab. 12 n-o 26 tekstas jene:

„Al la plej granda, potenca dio Soknopajo — de Asklepiado, filo de Areo. Ĉu estos permesate al mi, edzinigi Tapetheŭs-on, filinon de Marrēs, kaj ĉu ŝi ne fariĝos edzino de alia? Tion sciigu al mi kaj plenumu al mi, kion mi skribis. Antaŭe ja estis Tapetheŭs edzino de Horiono.“

En la jaro 35a de Cezaro (t. e. Aŭgusto), je la 1a de (la monato) Pahōno (t. e. 26a de Aprilo, 6 p. Kr.)“

La demando estas redaktita tute laŭ oficiala petskribo kun adreso kaj datumo. Naiva estas la opinio, ke la sanktulo eble ne ĉion scias; sekve la rimarkigo, ke la aspirata Tapetheŭs antaŭe estis edzinigita, kvazaŭ — laŭ stranga logiko — per tio li povus sin informi pri la persono de Horiono kaj la kialoj de la eksedziĝo.

Bedaŭrinde la respondo de la dio ne estas konata ĝis nun. —

Ke la popolamaso retenis konstante siajn idolanajn opiniojn kaj kutimojn kaj poste transigis ilin simple al la kristana Dio, tion pruvas alia papiruso (Oxy. VI, 925) el la kvina aŭ sesa jarcento.

„Dio, ĉionpova, sankta, verema, humana, kompatema kreinto kaj patro de nia Sinjoro kaj Savinto Jesuo Kristo, malkaŝu al mi la veron, estantan ĉe Vi: Ĉu Vi volas, ke mi iru Hiut-on, ĉu mi trovos Vin helponta al mi kaj bonvola? Tio efektiviĝu! Amen.“

La fina vorto estas reprezentita per nombra valoro (99) de la grekaj literoj (a = 1, m = 40, e = 8, n = 50); antaŭmetita estas la signo de la kruco.

Do eĉ pri bagateloj oni konsultis Dion.

**Je Kristnasko
donacu Esperanto-librojn!**

Juĝa protokolo

La procedon en juĝado klarigas papiruso (POxy. I 37) de la 29a de Marto 49 p. Kr. Jen la teksto:

„El la juĝaj protokoloj de la stratego*) Tiberius Claudius Pasiones. En la naŭa jaro de Tiberius Claudius Caesar Augustus Germanicus Aŭtokrato, je la 3a de Pharmuthi, antaŭ la tribunalo. Proceso de Pesuris kontraŭ Saraeus.“

Advokato *Aristokles* pledas por Pesuris:

„En la sepa jaro de Tiberius Claudius Caesar Sinjorestro, Pesuris, por kiu mi parolas, estas levinta el sterkejo virseksan sklavinfanon nomitan Heraklas. Ĉi tiun li enmanigis al la kontraŭulino. Tie estiĝis nutristina kontrakto pri la filo**) de Pesuris. Por la unua jaro ŝi ricevis la alimentojn. Ekestis la datreveno duajara, kaj ŝi ree ricevis. Ke mi diras la veron, pruvas la skribaĵo de ŝi, per kiu ŝi ricevinte kvitanco. Sed tial ke la infano estis malsatanta, Pesuris forprenis ĝin. Poste trovinte bonokazon, ŝi penetris en la domon de nia kliento, rabis la sklavinfanon kaj volis ĝin forigi, pretekstante, ke ĝi estas libera. Mi havas unue la dokumenton pri la nutristina kontrakto, due la kvitancon pri la alimentoj. Mi postulas, ke ili estu rezervataj (en la aktoj).“

Saraeus: „Mi estis demamiginta mian infanon; tiam ilia sklavinfano estis enmanigata al mi. Mi ricevis de ili entute 8 staterojn***). Poste mortis la sklavinfano; restas ankoraŭ la stateroj. Nun ili volas forpreni mian propran infanon“

Theon (la juĝeja skribisto): „Aktojn pri la sklava infano ni havas.“

La *stratego* (kiel *juĝisto*): „Ĉar la infano laŭ la fizionomio ŝajnas aparteni al Saraeus, mi juĝas, ke, se ŝi mem kaj ŝia edzo memskribante atestas pri la morto de la sklavinfano transdonita al ŝi de Pesuris — laŭ la decido de la potenca prefekto †) — ŝi redoninte la monon, kiun ŝi estis ricevinta, retenu sian propran infanon.“

Jen juĝo preskaŭ laŭ Salomono.

La papiruso interesas ne nur humane pro la sorto de la du infanoj, sed ankaŭ juriste koncerne la fakton, ke la stratego (kiel fine klariĝas) juĝas surbaze de kvazaŭ antaŭdecido de la provincestro. Do la objekto de disputo unue estas prezentita al la imperiestra gubernisto; ĉi tiu sendas ĝin, kune kun instrua dekreto, al la distriktestro, kiu nun prezidante gvidas la diskutadon kaj proklamas la juĝon.

Cetere la proceso estis daŭrigata. Ĉar ekzistas (POxy. I 38) petskribo de Tryphono, edzo de Saraeus, adresita al la provincestro Kapito, laŭ kiu Syro (la greka nomo por Pesuris) ne redonis la infanon spite de la publikigita juĝo. Kiel la afero finiĝis, bedaŭrinde ni ne scias.

*) t. e. distriktestro.

**) Do verŝajne Pesuris tuj adoptis la trovitan sklavinfanon.

***) La egipta statero valoris tiom, kiom la svisa franko. Do Saraeus ricevis ĉiujare 4 staterojn (= 4 frankojn), por mannutri la infanon, ridinde malgranda monsumo laŭ modernaj proporcioj.

†) t. e. la provincestro.

Geedzoj

Vere kortuŝa — sekve de la simpla maniero esprimi la ĉagrenon de vundita koro — estas jena letero (PLond. I 42 = Wilcken, Krestomatio n-o 97 el la jaro 168 a. Kr.) de iu soleca edzino al la nefidela edzo. Ĉi tiu formigris malproksimen kaj nun restas apud la urbo Memphis en la Sarapejo*). Ĉiuj liaj kamaradoj jam estas hejmirintaj; nur li ankoraŭ hezitas. Laŭdire, kvazaŭ demono, li estas retenata per „dia aresto“ (kies esenco ne estas evidente klara eĉ al kompetentuloj). Tamen oni ne sufiĉe fidis al li; eble li intence malzorgas pri sia familio. Des pli sincere ni kompatas la malriĉan mizeran edzinon, kiu skribas jene:

„Isias salutas sian fraton (laŭ egipta kutimo anstataŭ edzo) Hefestion. Se vi bonfartas kaj ĉio prosperas al vi laŭdezire, estas tiel, kiel mi konstante preĝas al la dioj. Ankaŭ mi mem estas sana kaj nia infano kaj ĉiuj domanoj, kiuj ĉiam memoras vin**). Ricevinte de Hōro vian leteron, en kiu vi sciigis, ke vi estas retenata en la Sarapejo apud Memphis, mi tuj dankis al la dioj pro tio, ke vi bonfartas. Kontraŭe pri tio, ke vi ne prezentis vin, dum kiam ĉiuj aliaj, tie tenitaj en aresto, reiris hejmen, mi estas tre malĝoja. Ĉar, kaŭze de tiaj cirkonstancoj, mi devis perlabori nutri min kaj vian infanon; do mi enfalis en ĉian embarason pro la altaj prezoj de la manĝaĵoj. Kaj mi opiniis, ke almenaŭ nun, se vi alvenus, mi sukcesus iom ekriprozi. Sed vi tute ne pensis pri via hejmiro kaj ne zorgis pri nia mizero. Ĉar jam kiam vi ĉeestis, mi ja ĉiel mankhavis, tiom pli nun, kiam aliĝis tia akcidento***), kaj vi sendis nenion. Krome, ĉar Hōro transdonante vian leteron anoncis, ke vi estas eligita el la dia aresto, mi estas tute afliktita. Certe tial, ke ankaŭ via patrino nun suferas. Vi ja bonfaros al ŝi kaj al ni, reveninte en la urbon, se ne tre grava kaŭzo vin retenos. Tamen nian dankon vi jam gajnos, zorgante pri via korpo, por ke vi restu sana. Adiaŭ! Jaro II a (de la reĝo Ptolemeo VIII.) je la 30a de (la monato) Epiph (= 24a de Julio).“

Kontrasta estas la letero (POxy. IV 744) de Hilarion al sia edzino Alis el la jaro I a. Kr. Ankaŭ li postlasis hejme la edzinon kaj infanon kaj estas foririnta Aleksandron, por tie sin vivteni kiel laboristo. Liaj kunuloj jam estas revenantaj hejmen; sed li ankoraŭ restadas en la granda urbo. Tiam ektimas lia edzino, hejme estanta en mizero, precipe ĉar ŝi atendas sian akuŝiĝon. Per amikino (Aphrodisias) vojaĝanta Aleksandron, ŝi informas Hilarion-on pri sia ĉagreno kaj admonas lin, ke li ne forgesu siajn familianojn. Nun ŝi ricevas ne monon, sed leteron, kies ĉefaj frazoj tekstas jene:

„Hilarion plejmulte salutas sian fratino Alis kaj sinjorinon Berūs (eble la patrino) kaj Apollonarin (lia infano). Sciuj, ke ni estas ankaŭ nuntempe en Aleksandrio. Sed ne maltrankviliĝu! Mi petas kaj admonas vin: zorgu pri la infano! Tuj, kiam mi estos ricevinta salajron, mi sendos iom al vi supren. Kiel mi povus vin forgesi!“

*) Sarapis estis dio en Egiptujo tiam multe adorata.

***) Ĉi tiu frazo en la originalo estas nur poste enigita, por aldoni iom pli da karesemo.

****) Tempo de malsatego.

Sed tiun karesemon strange kontrastas la senkompata, ne humana konsilo: „Kiam vi — bonŝancon! — naskos, lasu ĝin vivi, se ĝi estos virseksa — sed se virina, forjetu ĝin!“

Jaro 29a de Caesar (Augustus) je la 23a de Payni (= 17a de Junio).“

Ĉu li estas obstina, indiferenta pri sia ido? Ĉu li estas efektive, kion lia nomo signifas, gajemulo, sentaŭgulo, celanta nur sian plezuron en la granda urbo? Aŭ ĉu ni maljuste interpretis la skribaĵon? Sendube — jen abomena, emocianta sceno, prezentita el la plej malnobla klaso de la popolamaso, okazinta preskaŭ en la jaro, kiam naskiĝis la Savinto de la homaro, la granda amiko prefere de la infanoj, al kiu rifuĝas ĉiuj penaduloj kaj mizeruloj.

Spritaĵoj

Ĉe la svatisto

„Nu, kiel plaĉis al vi la fraŭlino, al kiu mi hieraŭ prezentis vin? Ĉu ŝi ne havas admirindajn okulojn? En la okuloj, kiel vi ja scias, sidas la koro!“

„Ĉu la koro ankaŭ strabas?“

La ĝentila vendisto

„Ĉi tiu ŝtofo taŭgas nur por junaj sinjorinoj, ĉu ne?“

„Ho, fraŭlina moŝto, vi certe ne estas duone tiel aĝa kiel vi aspektas!“

Malgrandaj sagacaĵoj

Estas la malprofito de multaj homoj, ke ili ĉiam konsideras nur sian profiton.

*

Estas abomenindaj malavaruloj, kiuj al la virino de sia koro nur sin mem kaj nenion alian metas antaŭ la piedojn.

*

Ĉu ne estas mirige? Por akiri honoron, multaj homoj oferas sian honoron.

*

Kial kelkaj virinoj profitas per la filmo? Ĉar ili igas silenti sian buŝon kaj paroligas siajn okulojn.

*

La lingvon de la faktoj oni komprenas ĉie en la mondo.

En restoracio

Kelnero (al distrita gasto, kiu ĵus sidigis ĉe tablo): „Belan veteron ni havas hodiaŭ, sinjoro Doktoro!“

„Bone, alportu al mi de ĝi!“

Ĉiam trafresponda

Elpoŝa ŝtelisto (kiu estas kaptata dum ŝtelo kaj transdonata al policano): „Estas vere mirige, ke unu fojon policano ĉeestas, kiam li estas bezonata.“

Ankaŭ Kolumbo jam ...

„Kiel okazis, ke Kolumbo eltrovis Amerikon?“

„Nu, li volis havi dolarojn!“

La kaŭzo

„Ĉu via edzino mem kuiras?“

„Kompreneble, alie mi ja ne manĝus en restoracio.“